

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

සමස්තයන්
ප්‍රකාශනප්‍රධානියා

Tatjana Holjevac alparolas la esperantistojn



Ĉi-numere legu pri:

**SIMPOZIO "ESPERANTO KAJ KROATA
KULTURA IDENTĈO"**

**SOLENA JARKUNSIDO - LA LASTA
ARANĜO DE LA JUBILEA JARO**

PREMIO "KALENDULO"

UZE OKAZIGIS SIAN JARKUNVENON

APERIS GRANDA VORTARO

ESPERANTA-KROATA DE LUCIJA BORĈIĆ

6

2008

RESUMO

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakciaĵoj:

Marica Brletić, Snježana
Habulin, Vida Jerman, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro,
marto, majo, julio, septembro
kaj novembro). En 2008 aperos
ses numeroj.

Jarabono por 2009:

en Kroatio: 75,00 kunaĵoj
al ĝirkonto de UZE
2340009-1110321529
alilande: 15,00 eŭroj
al UEA-konto: uzes-y

Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5
IT-34129 Trieste
orbispictus@iol.it

La jubilea jaro 2008, en kiu la kroataj esperantistoj solene festis sian centjariĝon, venis al la fino. Ĝi estis kronita per pluraj gravaj eventoj, pri kiuj vi povas detale legi en la lasta ĉi-jara numero de nia revuo. En la organiza kaj programa sencoj, certe menciindas tri gravaj eventoj: la solena koncerto en la Koncertejo "Vatroslav Lisinski" en Zagrebo (pri kiu ni jam skribis), Simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco" okazinta en Filozofia fakultato en Zagrebo kaj la solena kunsido "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio", okazinta en Zagrebo (pri kiuj ni publikigas respektivajn tekstojn ĉi-numere). En la eldona senco, certe la plej grava evento en Kroatio, ne nur ĉi-jara, sed certe "la evento de jardekoj", estas la aperigo de la longe atendata plej ampleksa Esperanto-vortaro por kroatoj: *Granda Vortaro Esperanta-Kroata* de Lucija Borčić, kiu por la rezulto de sia multjara penado estis premiita per Premio "Kalendulo" por 2008.

La numero 6/2008 de "Zagreba Esperantisto" ĉiusence estas pli "nacia" ol "internacia", sed jam la komencaj numeroj de 2009 estos dediĉitaj al aliaj, multe pli internaciaj temoj. Ankaŭ estonte nia redakcio zorgos kiel eble plej detale informi pri Esperantaj eventoj en Kroatio, aparte pri la agado de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, ni plene dediĉos niajn tekstojn ankaŭ al diskonigo de la kroataj kulturo, literaturo, arto ktp., sed nemalofte ni dediĉos atenton ankaŭ al plene internaciaj temoj. Pro tio, la unua numero en 2009 estos miksaĵo de diversaj temoj, sed la n-ro 2/2009 estos preskaŭ komplete "pola numero". En tiu numero ni detale parolos pri multaj diversaj aranĝoj okazontaj en 2009 en la "lando gastiganto" ... Eble io el tiuj aranĝoj allogos vin!

Antaŭ ĉio ni tamen atentigas vin, ke ni venis al la fino de nia dua aperjaro, kaj ke la vivo de ĉiu revuo dependas ne nur de la redakcio, sed multe pli de la kunlaborantoj kaj abonantoj. Tial, tuj pensu pri la demando:

ĈU VI JAM REABONIS NIAN REVUON, KAJ ĈU ĜI ESTONTE MERITAS VIAN ATENTON?

Se la respondo al la unua demando estas pozitiva, vi jam respondis ankaŭ al la dua parto de la demando. Se la respondo estas negativa, pripensu, ĉu vi volas pligrandigi la ŝancojn ke ni havu belan kaj regulan gazeton ankaŭ estonte. La konto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj n-ro **2340009-1110321529** ĉe Privredna banka kun danko akceptos viajn abonojn enlande, kaj niaj perantoj aŭ nia UEA-konto **uzes-y** internaciskale. Anticipan dankon kaj bonan legadon estonte, deziras

LA JUBILEA JARO EL MIA VIDPUNKTO

✍ Davor Grgat



Skribi pri la festado de la centjariĝo de Esperanto en Kroatio sen menci la eventon kiu okazis fine de la pasinta jaro en Rijeka, ne sufiĉas, ĉar ankaŭ ĝi estis parto de la jubilea programo. Jam komence de la jaro 2007 miaj bonaj Esperanto-amikoj el Rijeka kaj Opatija abunde min informis pri "Adriatika Ligo Esperantista", la unua Esperanta organizo en Rijeka kaj en Kroatio, kiu sian centjariĝon festos en novembro 2007.

La datrevenan solenaĵon ankaŭ mi partoprenis. Pri miaj impresoj dufoje mi skribis en la gazeto "Slobodna Dalmacija" kaj informis la anaron de la Esperanto-societo Split. Kaj nun, post tiom da tempo, mi opinias ke la evento ne bezonas longan komenton. Por ĉiuj partoprenintoj ĝi restos en longa memoro, ĉar esperantistoj venis el la tuta lando tiom amase, ke oni povintus okazigi Esperanto-kongreson da kroataj esperantistoj.

La solenaĵo "100 jaroj de Esperanto en Kroatio" sekvis fine de majo 2008 en la Koncertejo "Vatroslav Lisinski" en Zagrebo. Bedaŭrinde tiun solenaĵon mi ne partoprenis. Mi sufiĉe legis pri ĝi en Esperanto-gazetaro, sed nenion en la nacilingva. La opinioj pri ĝi estis dividitaj, kaj pro tio mi ne povis havi unuecan vidpunkton. Sed, pri la festo mi povas diri ĉion la plej bonan. Pro kio? Ĝuste pro tio ĉar la vasta publiko malmulton scias pri Esperanto, kaj tioma nombro da "eksteraj amikoj", varŝajne ne venis nur pro amuzo, sed kiel rezulto de ĉiutaga agado de agemaj esperantistoj el Zagrebo, nome de Kroata Esperanto-Ligo. Laŭ mia opinio, la negativaj komentoj, interalie legitaj ankaŭ en "Zagreba Esperantisto", estas starpunktoj de unuopuloj, ĉu nebone informitaj ĉu mem ne sciintaj kion fari por plibonigo de la movado, por kio batalas multaj sinceraj kroataj esperantistoj. Cetere, la venintaj kaj partoprenintaj 1500 esperantistoj kaj gastoj plej bone montras ke al la organizado de la festo estis investita granda potenco kaj laboro, kion neniu povas neglekti.

La sama rezulto venis post la Simpozio en la zagreba Filozofia fakultato titolita "ESPERANTO KAJ KROATA KULTURA IDENTECO", ĉar ankaŭ tie partoprenis multnombraj kulturaj kaj sociaj agantoj, aktivantaj por sukceso de Esperanto.

La tria (sukcesa) programero dum 2008 estis la festkunado okazinta en la Malnova konsilantarejo de la Urbo Zagrebo, kie nin salutis la prezidantino de la urba konsilantaro Tatjana Holjevac. Tiufoje ni estis detale, kiel neniam antaŭe, informitaj pri la evoluo de Esperanto en

Kroatio. Parolis inter aliaj, Radenko Milošević, Spomenka Štimec, Vida Jerman, Josip Pleadin ...

En la Malnova konsilantarejo de Zagrebo, el la plumo de Josip Pleadin ni aŭdis tre precizan kaj abundan rakonton pri la historion de la movado en Kroatio, kaj neniu el la ĉeestintoj estis surprizita per atribuo de la Premio "Kalendulo" al Lucija Borčić, pro la tiutage prezentita "Granda Vortaro Esperanta-kroata". Tiu evento por ni esperantistoj signifas multon, precipe por tiuj kiuj deziras progresigi sian lingvo-scion, ĉar la aperinta vortaro estas la plej detala kaj la plej granda en la tuta Esperanto-historio en Kroatio.

Do, fine ni konkludu: Esperantistoj, ne gravas el kiu urbo, aŭ regiono, eĉ ne el kiu lando de la mondo, komune agas por plifortigi la movadon, sed se ni laboras inter ni mem, ni nian atingos kontentigajn rezultojn. Ĝuste pro tio gravas la kvar menciitaj aranĝoj, kiuj atentigis la vastan publikon pri nia ekzisto kaj niaj rezultoj, kaj interesigis ilin pri Esperanto. Kredu, karaj gesamideanoj, ke multaj el ili pli aŭ malpli frue povus esti esperantistoj, apogantoj aŭ simpatiantoj de nia movado.

Kaj fine, permesu al mi eldiri ankoraŭ unu tre gravan rimarkon, aluditan de s-ano Ivo Puharić. Dum la jubilea jaro ni faris nur unu eraron. Tiu okazo estis la plej oportuna por premii aŭ atribui alemanŭ okazajn diplomojn al la plej meritaj esperantistoj, precipe al tiuj kiuj pli ol 50 jarojn aktivis en la landa Esperanto-movado. Tio postulis minimumon da mono, sed ĝi estus modesta publika rekono por multjara por-Esperanta laboro. Ĝi elvokus animan kontenton de malnovaj esperantistoj kaj donus inspiron al novuloj por estonta laboro.

ESPERANTO KAJ KROATA KULTURA IDENTECO



 Redakcia kompilo



Okaze de la centjarigo de la organizita nacia Esperanto-movado en Kroatio, Kroata Esperanto-Ligo kaj Filozofia fakultato de Universitato Zagrebo organizis la 7an kaj 8an de novembro 2008 internacian fakan kaj scian simpozion titolitan **Esperanto kaj kroata kultura identeco**. La organizantoj invitis prelegantojn kiuj pritraktis kvar ĉefajn temarojn – unu ĝeneralan kaj tri specifajn. Kadre de la ĝenerala temaro oni parolis pri diversaj aspektoj kaj problemoj de la nuntempa internacia komunikado tuŝante ankaŭ Esperanton

Supre: La partoprenantoj de la Simpozio dum la laboro. Maldekstre: Damir Boras, la prezidanto de la organiza komitato, Miljenko Jurković, rektoro de Filozofia fakultato en Zagrebo, Velimir Piškorec (staras), docento ĉe la Germana fako, kaj la scienca novicino Aleksandra Šćukanec, sekretario de la Simpozio dum la solena malfermo.

kiel eblan solvon. Prelegoj kadre de aliaj tri temaroj rilatis al: 1. historio de Esperanto en Kroatio, 2. rolo de Esperanto kiel pontolingvo por prezentado de kroataj kulturaj atingaĵoj eksterlande kaj 3. agado de kroataj esperantistoj sur la ne-esperantisma kampo. La Simpozion partoprenis dudeko de invititaj prelegantoj – kaj esperantistoj kaj neesperantistoj.

La prezidento de Respubliko Kroatio sinjoro Stipe Mesić, jam bone konata apoganto de aktivecoj de kroataj esperantistoj, transprenis la altan aŭspicion de la Simpozio.

La Simpozio havis **organizan** kaj **honoran** komitaton. Prezidanto de la organiza komitato estis profesoro **d-ro Damir Boras**, vicdekano ĉe zagreba Filozofia fakultato por scienco kaj internaciaj rilatoj kaj estro de Katedro por leksikografio kaj enciklopedistiko de Fako por informsciencoj. Aliaj du organizaj komitatanoj estis **magistro Radenko Milošević**, ekskonsilisto ĉe Kroatia Ekonomia Cambro kaj ekstro de ĝia sekcio por markoekonomiaj analizoj, kaj **d-ro**


Hrvatski savez za esperanto
Filozofski fakultet Sveučilišta u Zagrebu
imaju čast pozvati Vas na svečano otvaranje znanstvenog skupa

Esperanto i hrvatski kulturni identitet

što će se održati u petak, 7. studenoga 2008. g. u 10 sati
u Vijećnici Filozofskoga fakulteta Sveučilišta u Zagrebu.

Znanstveni skup dio je proslave stoljetnice utemeljenja
prve nacionalne esperantske udruge u Hrvatskoj
Društvo hrvatskih esperantista, a odvijat će se
7. i 8. studenoga 2008. g. na Filozofskom fakultetu
pod visokim pokroviteljstvom
predsjednika Republike Hrvatske Stjepana Mešića.

Raporto



Prezidento de Kroatio,
s-ro Stjepan Mešić estis
la aŭspicianto de la Simpozio

Velimir Piškorec, docento ĉe la Germana fako de Filozofia fakultato kaj kroata UEA-fakdelegito por lingvistiko. S-ino **Aleksandra Šćukanec**, scienca novicino ĉe la Germana fako de Filozofia fakultato, estis la sekretario de la Simpozio.

La honoran komitatano prezidis ano de Kroata akademio por artoj kaj sciencoj kaj honora komitatano de UEA **d-ro Dalibor Brozović**. La ideo organizi simpozion kun la prezentita temaro estis varme apogita ne nur de pliaj du membroj de Kroata akademio de artoj kaj sciencoj, nome de profesoro pri latinidaj lingvoj **d-ro August Kovačec**, kaj profesoro **d-ro Mislav Ježić**, unu el la plej konataj kroataj hindologoj kaj filologoj, sed ankaŭ de aliaj du profesoroj ĉe la Filozofia fakultato en Zagrebo: **dr-ino Zrinjka Glovacki-Bernardi**, elstara kroata germanistino kaj lingvistino, kaj profesoro **d-ro Josip Silić** kroata lingvisto famiginta kiel aŭtoro de gramatikoj kaj ortografiaj manlibroj pri la kroata lingvo. Unu el la plej respektindaj kroataj teologoj kaj verkistoj **profesoro d-ro Ivan Golub** ankaŭ estis membro de la honora komitato, same kiel nestoro de kroata esperantismo **prim. d-ro Ivo Borovečki**, emerita radiologo kaj honora membro de UEA. Internacian esperantistan komunumon reprezentis en la honora komitato **d-ro Detlev Blanke** el Germanio, mondfama interlingvisto kaj prezidanto de *Gesellschaft für Interlinguistik*. La tuta projekto por organizi la Simpozion ne estus ebla sen senhezita kaj varma apogo de la dekanato de Filozofia fakultato, la fama kroata arthistoriisto **profesoro d-ro Miljenko Jurković**, kiu disponigis la plej solenan ejon de la fakultato por okazigo de la Simpozio kaj decidis ke Filozofia fakultato organizu ĝin kunlaborante kun Kroata Esperanto-Ligo.

SALUTMESAĜO DE LA ŜTATPREZIDENTO STJEPAN MEŠIĆ

Estimataj

Estas granda kontento por mi kiel aŭspicianto, saluti ĉiujn ĉeestantojn de la solenaĵo per kiu oni festas la centjariĝon de aktivado de Kroata Esperanto-Ligo. Zagrebo jam kelkfoje estis gastiganto de kunvenoj de esperantistoj, kies laboro en Kroatio estis signita per multaj fakaj seminarioj, publikaĵoj kaj literaturaj tradukoj. Aparte gravas, ke dum cent jaroj de sia agado Kroata Esperanto-Ligo grupigis grandan nombron da homoj kiuj per lernado de tiu lingvo akcelis la ideon de egaleco kaj egalrajta dialogo, tiom necesa en la nuntempa mondo.

Al ĉiuj ĉeestantoj de la scienca simpozio kaj de la ĉi-jara festo, mi deziras ankaŭ plue multajn laborsukcesojn, kaj al la membroj de Kroata Esperanto-Ligo mi gratulas la jubileon.

Elkore

Stjepan Mešić

Zagrebo, la 7-an de novembro 2008

Per teknika helpo de s-ro Slavko Ribić estis surbendigitaj ĉiuj prelegoj de la Simpozio, kiuj haveblas kiel MP-3 formata kompaktdisko. Li ankaŭ realigis la filmadon de la solena malfermo, kaj haveblas koncerna filmo sur lumdisko. Ambaŭ diskaj mendeblas ĉe la redakcio de "Zagreba Esperantisto".

ESPERANTLINGVA SALUTPAROLADO DE LA PREZIDANTO DE LA ORGANIZA KOMITATO, prof. d-ro DAMIR BORAS



Estimataj gesinjoroj, karaj gastoj kaj studentoj, esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, estas por mi aparta honoro kaj granda plezuro bonvenigi vin nome de la Organiza komitato de la Simpozio **Esperanto kaj kroata kultura identeco**, okaziganta hodiaŭ kaj morgaŭ far nia fakultato kaj Kroata Esperanto-Ligo.

Ekzistas diversaj difinoj de la nocio kulturo, sed en la kroata ĝenerala lingvouzo tri el ili estas aparte menciindaj. En vasta senco de la nocio, kulturo de iu komunumo entenas ĉiujn rezultojn de korpa kaj mensa agado de ĝiaj membroj, inkluzive tradiciojn, morojn, lingvon, literaturon kaj arton. En elitista senco kulturo rilatas nur al kreivaj, artaj atingoj de iu komunumo. Krom tiuj du signifoj, en la kroata ĉiutaga lingvo ni havas ankoraŭ alian specifan signifon, kaj tiu estas: bona konduto.

Kultura identeco de iu komunumo rilatas al la fakto, ke ĉiu komunumo estas sinkrone kaj diakrone specifa, neripetebla kaj unueca fenomeno. Pro tio la historio kaj nuntempo de la homaro estas nenio alia ol la historio kaj nuntempo de diversaj kulturaj identecoj, kiuj tempe kaj loke ade ŝanĝiĝas, interplektiĝas kaj komplementiĝas, sed bedaŭrinde ankaŭ inter si konkuras kaj konfliktas.

Kiam ni parolas pri la kroata kultura identeco, kaj la samo validas ĝenerale por ĉiu nacia identeco, ni pensas precipe pri la kultura specifeco de kroatoj kaj membroj de aliaj etnaj grupoj sur la

teritorio de Kroatio, sen rilato al etna deveno de iliaj prauloj, ĉar – montris al ni la historio kaj montras ankaŭ la nuntempo – apartenado al nacia korpuso fakte ne estas kategorio mezurebla per ies kvanto de tiel nomataj sangeroj, sed unuavice ĝi havas sian spiritan, psikologian kaj kulturalan dimension. Pro tio ne estas oksimorono, se ni diras, ke homogeneco de la kroata kulturo – kaj tio validas por multaj aliaj naciaj kulturoj – speguliĝas en ĝia heterogeneco.

Kultura kaj lingva diverseco estas historia fenomeno de la homaro, same kiel la fakto ke inter ili ekzistas gravaj diferencoj rilate al kvanto de iliaj membroj kaj ilia ekonomika kaj politika forto. La dorsflanko de tiu diverseco bedaŭrinde speguliĝis kaj ankaŭ hodiaŭ speguliĝas en diversaj formoj de politika, ekonomia, lingva kaj kultura imperiismo. Sed la genia lingva inventaĵo de Ludvig Lazar Zamehof jam pli od cent dudek jarojn servas kiel alternativa modelo de internaciaj kontaktado kaj komunikado, ebligante al membroj de malgrandaj popoloj kaj kulturoj komunikan egalrajtecon kun membroj de grandaj popoloj kaj kulturoj. Jam cent jarojn Esperanto servas ankaŭ al kroatoj kiel ilo por kultura interŝanĝo, kion montras multnombraj atingoj sur la kampo de Esperantigo de kroata literaturo kaj teatra arto, sed ankaŭ rilate al originala Esperanta literaturo skribita kaj skribata de kroataj aŭtoroj. En nia simpozio okaze de centjariĝo de la fondiĝo de la unua tutnacia Esperanto-organizo Unuiĝo de kroataj esperantistoj, el diversaj vidpunktoj estos prilumitaj la kontribuoj de Esperanto al prezentado de kroata kulturo internacive, sed ankaŭ la rezultoj de kroataj esperantistoj en ilia perado de aliaj kulturoj en Kroatio.

Nia fakultato senhezite apogas kaj instruadon de Esperanto kaj ĝian sciencan esploron – ni menciuj ekzemple la ĉi-jaran gastadon de la fama germana interlingvisto Detlev Blanke kadre de internacia kunlaboro kun Universitato Humboldt el Berlino, kaj la fakton, ke nia Germana fako ofertas al studentoj de la germana lingvo kaj de la tuta fakultato seminariojn nomatajn Planlingvoj kaj Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto. Menciinde estas ankaŭ, ke nia nova grandega biblioteko, dank' al la donacitaĵo de nia profesoro August Kovačec, havos estonte ankaŭ librokolekton pri interlingvistiko.

Kiel vicdekano pri scienco kaj internaciaj rilatoj de Filozofia fakultato mi deziras al vi ĉiuj fruktodonan laboron dum la simpozio kaj esprimas mian senhezitan apogon al viaj peresperantaj klopodoj, ankaŭ en estonteco esti ambasadoroj de la kroata kulturo eksterlande kaj perantoj de aliaj kulturoj en Kroatio.

Vivu!



prof. d-ro Vinko Brešić ESPERANTA ANTOLOGIO DE KROATA POEZIO DE MAVRO ŠPICER

Transformiĝo de ilira literaturo, ekzistanta antaŭ la periodo de la nacia renesanco en Kroatio dum la unua duono de la 19a jarcento, en la nacian kroatan literaturon estis akompanata de antologia praktiko kiel unu el formoj de literatura reprezentado. Tiu reprezentado estis baze dudirekta: unuflanke direktita al si mem kaj legitimiĝo de sia propra tradicio kaj bildo, kaj aliflanke direktita al aliaj literaturoj kaj kulturoj, de kiuj ĝi atendas agnoskon de la propra identeco kaj poziciigon kadre de eŭropa kunteksto. En tiu senco August Ŝenoa kompilis ambaŭ siajn antologiojn – la unuan por la Monda ekspozicio en Parizo (1873) kaj la duan (1876) laŭ la mendo de nacia kultura organizo Matica hrvatska (esp. Abelreĝino Kroata), kiu pli frue nomiĝis "ilira". La tria antologio de kroata literaturo kunmetita de Badalić (Kroata Antologio, 1892) estis la nova paĝo al kanoniĝo de la juna nacia literaturo.

La unua antologio de la kroata literaturo en la 20a jarcento, kiu samtempe estis fremdlingva, aperis kiam la konstruprocezo de la nacia literaturo bazita sur naci-renesanca matrico jam finiĝis, kaj la kanoniĝo jam atingis ĉiujn nivelojn de la literatura sistemo, tiel ke kun modernismo la kroata literaturo malfermiĝis por novaj procezoj, kadre de kiuj ĝi estis montronta ŝlosilajn trajtojn de novaj eŭropaj literaturaj tendencoj. La pioniran lokon en tiu ŝtupo de antologia praktiko okupas hodiaŭ la malpli konata Mavro Špicer (Našice, 1862 – Zagreb, 1936) kaj lia Esperantlingva antologio *Kroataj poeziaĵoj* (Zagreb, 1912). En nia laboraĵo estas analizataj la strukturo de la antologio, la rilato al ĝistiamaj simila antologia praktiko de la aŭtoro kaj la praktiko de ĝistiamaj kroataj antologioj kun la celo starigi konkludojn pri trajtoj kaj kriterioj de la modelo de la kroata poezio, al kiu Špicer per sia antologio donas reprezentan statuson.

Danijela Drakula APLIKO DE LA TEORIO DE REZONA AGADO EN PROGNOZO DE ENGAĜIĜO POR ESPERANTO

La ĉefa celo de la esplorado estis per la baza modelo de rezona agado ekzameni prognozeblecon de engaĝiĝo por Esperanto en la sampla de esperantistoj. La modelekzamenado estas farita en la sampla de 125 partoprenantoj, ambaŭ-seksaj, aĝaj inter 15 kaj 84 jaroj. Estas aplikita la demando Esperanto-2001 konstruita por la bezonoj de tiu ĉi esploro. La modelo estis esplorata per variabloj: sintenoj al disvastigado de Esperanto, percepto de socia subteno (socia normo), konduktintenco kaj

konduko.

Enkadre de la esploro por diplomverko, sed ne en la skribita prezentado mem, estas analizitaj ok variabloj karakterizaj por Esperanto komunumo. Ĝi enhavas pli sociologiajn ol psikologiajn trajtojn. Tiuj variabloj estas kvar demografiaj (seksa, aĝo, profesio kaj edukiteco) kaj kvar kiuj temas pri esperantisteco (motivaĝo por okupiĝi pri Esperanto, aktiveco en tiu okupiĝo, fonto kaj jaro de la ekscio pri Esperanto).



István Ertl LA LIMOJ DE NEŬTRALECO, AŬ: ESPERANTO, ĈU NACIE NEŬTRALA ILO POR INTERNACIA KOMUNIKADO?



Ĉu ekzistas, povas ekzisti ilo kiu estas neŭtrala por internacie komuniki? Je unuagrada senco, certe. Se A kaj B interparolas en lingvo N, denaska nek al A nek al B, la duopo uzas neŭtralan ilon. Kompreneble, se A ial pli bone regas la lingvon N ol B, ekzemple ĉar A pasigis tempon en N-lingva lando, aŭ ĉar la denaska lingvo de A estas pli simila al N ol tiu de B, tiu neŭtraleco estas jam tre relativa ... Sed: neŭtraleco, el kiu vidpunkto? Ĉu neŭtrala en la senco de komunika egalrajteco, do ke A ne havas avantaĝon super B? Ĉu neŭtrala rilate la mondrigardon, la pens- kaj esprimmanieron proprajn al lingvo N? Se tiel, la neŭtraleco estos denove relativa, ĉar neniu lingvo N povas situi egaldistance al ĉiuj aliaj lingvoj. Ĉu rilate la kulturen enhavon peratan? Tio ankaŭ ne eblas, parte pro la sama kialo (malebla egaldistanco), parte ĉar la kultura enhavo kiu kreigas/esprimiĝas en la lingvo N, estas influata de la fonaj kulturoj de la N-parolantoj. Paradokse, nur senenhava lingvo estas neŭtrala – sed tio similas malplenan nuksoŝelon. Ĉu neŭtraleco politika? Tio ja eblas, se ni interpretas ĝin kiel egaldistancon al diversaj grandpotencoj kaj decidantaroj – sed apenaŭ eblas se ni komprenas politikon kiel specifan manieron

de la N-parolantaro organiziĝi kaj interagi. Al neŭtraleco eblas rigardi ankoraŭ el aliaj vidpunktoj, kaj tion la prelego celos. Sed ĝi ĉefe celos konkrete ekzameni kiel ĉio ĉi-supra aplikigas al Esperanto – kaj kiel trakti la tradician argumenton, aperantan ĉefe ĉe neesperantistoj, ke Esperanto estas tute, aŭ precipe, eŭropa fenomeno.

d-rino Eldi Grubišić Pulišelić MALHELAJ TIPOJ KAJ SERENAJ VIZAĜOJ: VIRINO EN VERKARO DE MAVRO ŠPICER



Fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcento la tiel-nomata virindemando fariĝis tiom interesa, ke tiatempe aperis multaj studoj kaj traktatoj pri virinoj. En tiu spirito Mavro Špicer publikigis en 1911 kultur-historian traktaton pri virinoj titolitan *Das Weib im Kriege und in der Politik* (Virino en milito kaj politiko).

Post ĝeneralaj pritaksoj de la grava rolo de virina sekso, Špicer okupiĝas pri virinoj, kiuj rekte aŭ nerekte akiris politikan influon en la historio. La aŭtoro substrekas oferemon kiel la plej gravan trajton de virino kaj difinas ŝian rolon nur en la limoj de la patriarka socia ordo: laŭ li virino estas estaĵo sen individueco, ŝi estas fidela akompanantino, patrino kaj edukantino, kaj – se bezonate – luktantino por bonfarto de la homaro. Lia insistado je tiel nomataj aŭtentikaj virinaj virtoj signifas samtempe malproksimiĝon de virina realeco, sed malkovras ankaŭ specife viran interpretadon de virina realeco.

La iom plivastigitan kaj ŝanĝitan enhavon de la preparolata libreto el 1911 Špicer publikigis kroatingve sub la titolo *Ženska duša u svjetlu povijesti* (Virina animo en la lumo de historio). En sia historia prezentado Špicer dividas virinojn je malhelaj tipoj kaj serenaj vizaĝoj, kaj en la postparolo li pritraktas la problemon de virina emancipiĝo komence de la 20a jarcento. Kvankam li principe subtenas egalrajtecon de virinoj, precipe sur la kampo de akademia edukado, la aŭtoro kritike observas tiujn virinojn, kiuj en spirito de emancipiĝo transpaŝas la limojn de la partiarka ordo malobeante burĝan etikan kodekson. La aŭtoro substrekas ĝojon je oferemo kiel ŝlosilan virinan trajton kaj ĝuste en tiu oferema t.e. aŭtentika virineco rekonas forton, kiuj povas haltigi la minacantan mondiliton.

En la rakonteto *Ženska duša* (Virina animo) Špicer prezentas virinan animon samtempe kiel

fonton de la plej altaj kaj plej malaltaj impulsoj, tiel ke lia malheroino spite al sia krimeco, sincere kompatas la suferon de iu papilio. Same kiel en liaj traktatoj pri virinoj ankaŭ en tiu ĉi rakonto montriĝas la negativa sinteno de la aŭtoro al virina sekseco, kiun li prezentas sole kiel detruigan potencon minacantan harmonion de la vira mondo.

d-ro Zlatko Hinšt INTERLINGVISTIKA ALIRO AL EKONOMIA TERMINOLOGIO KUN SPECIALA RERIGARDO AL SEMANTIKO DE NOCIOJ

En la artikolo-referajo la aŭtoro ekspozas la bazajn problemojn de interlingvistika aliro en la analizo de ekonomi(k) a terminologio, de la ekzistanta ĝis la proponoj pri ĝia plibonigo, uzante krom Esperanto, samtempe la signifojn en pluraj lingvoj. La lingva analizo en la uzado de t.n. “mondaj lingvoj” kaj aliaj eŭropaj lingvoj, speciale la kroata,



donas deirpunkton por kampo de semantiko, t.e. esploroj de origino, esenco kaj uzo de unuopaj nocioj en la ekonomia vivo kaj teorio. Sen klara determinado laŭ kvalitat semantikaj solvoj kaj ilia enkondukado en la praktikon de la lingvo, de ĉiutaga ĝis sciencofaka apliko, ĉio cele al preciza esprimado de nocioj, en ĉi-tiu kazo de ekonomia terminologio, lingvo ne povas iĝi sufiĉe preciza. Esperanto akiras grandan eblecon kiel plana lingvo, kiu jam havas jarcentan praktikon de komunikado, ĝi povas per rezultoj de esploroj elimini la difinitajn mankojn kaj solvi la problemojn de klareco kaj neambigueco de la terminoj. Tiucele estas farita klasifiko de bazaj problemoj en lingva analizo, kiuj estas kontestebaj aŭ reprezentas almenaŭ malfacilaĵojn en lingva praktiko. Tio estas unuavice homonimoj kaj sinonimoj, sed ankaŭ antonimoj kaj paronimoj. Aparte ĝi estas akcentita en la uzado de neologismoj, en senco de adekvata anstataŭigo de ekzistantaj terminoj, aŭ eĉ por iuj nocioj kiam ankoraŭ ne ekzistas konvenaj terminoj. Ankaŭ estas grava rilato al la angla lingvo, en senco de ĝenerale akceptitaj terminoj, plej ofte kun deviga uzado de iliaj mallongigoj kaj originalaj terminoj en teorio kaj praktiko, aparte en ekonomio. Krom tio la kvaliton de la lingvo influas ankaŭ apliko de gramatikaj reguloj kaj eblecoj de la lingvo, kaj aparte Esperanto bezonas certajn pridemandadojn.

Vlado Jurković ESPERANTAJ ELSENDOJ EN LA PROGRAMO DE KROATA RADIO (iama Radio Zagrebo)



La temo de la prelego rilatas la historion de Esperantaj elsendoj de Radio Zagrebo, kiuj komenciĝis la 25an de majo 1953 okaze de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Zagrebo samjare.

La elsendoj post plenaj 39 jaroj da kontinua funkciado finiĝis per arbitra

decido de la estraro de Kroata Radio en la jaro 1992.

Davor Klobučar OSIJEKA KVINOPO EL 1889 - LA UNUAJ ESPERANTISTOJ EN KROATIO

En tiu ĉi teksto temas pri la unuaj esperantistoj el Kroatio, kiuj anonciĝis en 1889 en la urbo Osijek, preskaŭ 2 jardekojn pli frue ol la organizita Esperanta movado kaj aliaj unuopuloj. Ili estis la unuaj ne nur en Kroatio, sed ankaŭ en la eksa Jugoslavio, kaj eĉ en la sudorienta Eŭropo. Kroatio estis tiam parto de Aŭstri-Hungario, kaj Osijek moderna kaj grava industria urbo. La internacia lingvo Esperanto aperis en 1887, kaj ĝia movado en 1889 estis ankoraŭ malgranda kaj malbone konata. La aŭtoro de la lingvo L. L. Zamenhof publikigis en 1890 adresojn de la unuaj 1.000 esperantistoj en la mondo, inter kiuj nur 81 estis el ekster Rusio. Inter tiuj 81 estis eĉ 5 junulinoj



el la urbo Osijek (la "Osijeka Kvinopo"). Nur en 1979 oni rimarkis tiun informon, kaj la osijeka esperantisto Antun Šimunić trovis kaj publikigis nur kelkajn bazajn faktojn pri la junulinoj. Ĉi tie estas prezentataj biografioj de tiuj personoj, kiujn plejparte esploris Davor Klobučar.

La junulinoj estis: fratinoj Hradil (Ana, Augusta kaj Ema),

Pilepić Marija kaj Hergović Natalija, kun respektivaj aĝoj en 1889: 24, 21, 18, 18 kaj 18. Ili loĝis en la osijeka parto Malsupra Urbo (Donji grad) en distanco de maksimume 200 metroj, kaj certe agis en konsento. Espereble dank' al tiu fakto aperos baldaŭ Esperanto-strato en Osijek, tre proksime al iliaj loĝlokoj. Tre akceptebla estas la hipotezo, ke Marija Pilepić estis la unua esperantisto, ĉar ŝia parenco Marta Frollo (verŝajne kuzino) estis la sola esperantisto en tiama Rumanio, kaj la patro de Marta estis tre elstara eŭropa lingvisto. La sorto de Ana, Augusta kaj precipe de Marija estas nun bone konataj. La sorto de Ema post ŝia edziniĝo ankoraŭ ne estas konata, kaj pri Natalija estas trovitaj nur malmultaj informoj. Klobučar emfazas, ke la informoj, kiujn pri Natalija trovis en 1984 la osijeka esperantisto Antun Šimunić, estas ĉiuj eraraj kaj forĵetendaj.

La artikolo mencias, por ĉiu membro de la Kvinopo, eventuale trovitajn naskiĝlokojn, fotojn, domojn kaj tombojn. La tombo de Marija Pilepić estas trovita en Opatija, kaj nun la Esperanta societo el Rijeka atingis, ke Marija Pilepić eniru la liston de elstaraj lokaj personoj, kies tombojn protektas la urbo Opatija. La artikolo fine mencias la spurojn, kiujn oni povas sekvi en eventualaj estontaj esploroj pri la Kvinopo.

d-ro Ulrich Lins IVO LAPENNA

Ivo Lapenna (1909-1987) estas naskita en Kroatio, sed pasigis la pli grandan parton de sia plenaĝula vivo en eksterlando. De 1949 ĝis sia morto li ĉiam restadis ekster Jugoslavio. Profesie lin plene absorbis la konstruo de profesia kariero en Parizo, poste en Londono, kaj verŝajne lian atenton eĉ pli okupis la zorgo pri Universala Esperanto-Asocio (UEA), en kiu li havis gvidajn postenojn dum pli ol tridek jaroj, de 1964 ĝis 1974 kiel Prezidanto. La referaĵo klopodas montri, kiugrade ĉe Lapenna la okupiĝo pri Esperanto radikis en la politika klimato de Kroatio en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj kaj kiom tio postefikis en lia scienca aktivado kaj precipe en lia agado por UEA. Aparta atento estos donita al la demando, kiel Lapenna en sia ekzilo rilatis al la politika evoluo en Jugoslavio.



d-ro Jozo Marević ESPERANTO SUR SPUROJ DE LA LATINO



Lingvaj baroj por la homaro ĉiam estis grandega malfacilaĵo. La plej eminentaj saĝuloj klopodis solvi ĝin. Estis kaj estas la t. n. mondlingvoj, sed ili neniam estis kaj hodiaŭ same tiel ne estas internaciaj lingvaj interkompreniloj. La latino estis larĝe kaj internacivele disvastigita. Tamen ĝi perdis sian rolon. Iusence restis ĝi kiel

eklezia kaj scienca lingvo. Oni multfoje provis revivigi kaj mondigi ĝin. Sed la plej sindonemaj adeptoj konfesis, ke endas serĉadi iun alian internacian lingvan komprenilon.

Pro gramatikaj kaj konversaciaj malfacilaĵoj la latino perdis sian rolon eĉ en Katolika eklezio, kiu vere estis ties apogcentro dum jarcentoj. La nuntempa homo, aliflanke, deziras lingvan simplecon kaj vivan komforton. Li tute ne pretas akcepti tiun lingvon, kiu estus tre malfacila por la plejparto da homoj.

Aliflanke, Esperanto, kiel la plej facila lingvo, ekzistinta sur spuroj de latino, havas nenian lingvan baron disvastiĝi kaj ekesti unika internacia lingva komprenilo. Obstakloj estas alispecaj: politikaj, financaj, ideologiaj.

Kroatoj vivis en la latina kulturo kaj latinlingva literaturo. Tiaj akceptis kaj ĉirkaubrakis la internacian lingvon Esperantan multnombre kaj dum unu jarcento kontribudis ĝia disvastigo.

mr Radenko Milošević PER LA LATINA HIERAŬ - PER LA KROATA HODIAŬ EN LA Batalo POR LA Kroata Lingvo kaj Kulturo

Kroatoj defendis kontu la latina lingvo per la kroata glagolado en la liturgio, kaj aliffoje oni defendis per la latina kontraŭ la germana kaj hungara lingvaj altrudoj. La lingvo kroata estis uzita kiel defendilo de la kroata ŝtat-jura kontinueco, kulturo kaj skriboscio, sed la latina lingvo ebligis diversajn kontaktojn kun Eŭropo.

La unuaj komencoj de la uzado de la latina lingvo estas ligitaj al kroata katolikismo, kaj ligitaj kun la ŝtat-juraj dokumentoj. La unua signifoplena



teksto latinlingva estis la ŝtateca konfeso, skribita la 7-an de junio en la jaro 879 de la papo Johano la 8-a, donita la la duko Branimir. Kroataj latinistoj, naskitaj kroatoj aŭ ligitaj kun la kroata teritorio, uzitaj la latinan lingvon kiel "eŭropan helplingvon", skribis multajn tekstojn, kiuj estis enkonstruitaj ne nur en la kroata, sed

ankaŭ en la eŭropa kaj monda literatura kaj kultura heredaĵo. Tiel estis ekde la unua komenco, de Herman Dalmato kaj Johano de Panonio ĝis Marko Marulić kaj Ruder Bošković.

Esperanto eniris en la kroatan kulturon, verkadon kaj scienccon jam en la jaro 1891 per la parolado de la akademiano Tomo Maretić ĉe la kunsido de la Akademio de sciencoj kaj arto. Postsekvis la tekstoj kroatingvaj de Mavro Špicer en kiuj li skribis pri Esperanto en la jaro 1908. De la unua tradukita poemo en esperanton de Petar Preradović "Nokta poemo", publikita en la germana lernolibro de Esperanto en 1907 kaj de la traduko en Esperanton de la romano "La trezoro de l' orajisto" de August Ŝenoa en 1911, estas esperantigita granda nombro de kroataj literaturaj verkoj kaj preskaŭ mil poemoj de ducent kroataj poetoj. En la plej novaj tradukoj en Esperanton tiu lingvo estas uzata kiel ponto-lingvo por tradukado el la kroata en aliajn lingvojn.

Vjekoslav Morankić RESUMO DE HISTORIO DE ESPERANTO-MOVADO EN URBO RIJEKA

La unua Esperanto-organizaĵo en urbo Rijeka kaj ankaŭ en Kroatio estis fondita la 28an de semptembro 1907 sub la nomo "Adratika Ligo Esperantista", kun la sekcio "Fiumana Esperantista Grupo" (Fiume estas itallingva nomo de Rijeka).

Estas konataj nomoj kaj adresoj de ĉiuj 37 partoprenantoj de la fondkunveno. Inter ili estis elektitaj membroj de la gvidkomitato, ka



prezidanto estis Lajos Orczy. La nura fakto ke 37 personoj ĉeestis la fondkunvenon indikas, ke ekzistas ebleco, ke esperantistoj aktivis en Rijeka antaŭ la fondkunveno. Ekde kiu jaro ili aktivis antaŭ la jaro 1907, pri tio ne ekzistas historiaj donitaĵoj. La ekzisto de la unua Esperanto-organizaĵo en Rijeka influis je disvolviĝo de Esperanto-movado en postaj jaroj en Rijeka kaj en la regiono de Rijeka. Inter la du mondmilitoj landlimo inter Jugoslavio kaj Italio trapasadis tra la centro de la nuna urbo Rijeka. Tial esperantistoj aparte agadis en jugoslavia respektive italia parto de la urbo.

Post liberigo de Rijeka (majo 1945) jam sekvontan jaron, la 8an de januaro 1946, estis en Rijeka fondita Esperanto-Societo "A. S. Turković". La fondkunvenon ĉeestis 35 esperantistoj. La tioma nombro de esperantistoj ĉe la fondkunveno montras, ke esperantistoj en la regiono de Rijeka aktivis senĉese inter la du mondmilitoj. La societo aktivas ankaŭ nun en Rijeka kaj Departmento de Rijeka (Primorsko-goranska županija) sub la nomo "Esperanto-Societo Rijeka". Oni taksas, ke ekde la jaro 1946 ĝis nun tra kursoj en Rijeka trapasis pli ol 4.000 personoj. La societo organizis plurajn gravajn internaciajn kaj landajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Aktivis ĝi senĉese, havas bibliotekon kun 1.400 libroj. Ĝi posedas junularan ripozejon "Esperanto Domo" kaj tial ĝi estas unu inter la plej riĉaj en tiu ĉi parto de Eŭropo. Hodiaŭ la societo havas 61 membrojn.

Kristian Novak MUZOJ SUB ARMILOJ. ESTETIKIGO DE MILITO EN PAROLADOJ DE MAVRO ŜPICER

Dum la periodo inter 1906 kaj 1911 Mavro Ŝpicer faris en Militsciencia Societo en Zagrebo kelkajn prelegojn pri militado kaj soldata profesio.



Krom la tre jesiga sinteno de la aŭtoro al la fenomeno de milito, en tiuj paroladoj tre interesaj estas filozofiaj refleksioj pri tiuj kaj parencaj temoj, kaj precipe la ideo pri nerompebla ligo kaj interagado inter arto kaj milito. En ĉi tiu laboraĵo estos analizataj temoj kaj motivoj menciitaj en la prelegoj. Krome, ni provos situigi ilin en historian kaj politikan

kuntekston kaj ĝenerale difini, kiaspeca publika diskurso ebligis estigon de tiaj tekstoj ĵus antaŭ la komenco de la Unua mondmilito.

d-ro Velimir Piškorec Aleksandra Ŝukanec KROATAJ ESPERANTO- LERNOLIBROJ

En la jaro 1909 aperis en Kroatio du priesperantaj manlibroj, kies aŭtoroj estis pioniroj de kroata esperantismo kaj fondintoj de la Unuiĝo de kroataj esperantistoj Danica Bedeković kaj Mavro Ŝpicer. Dum la periodo inter la du mondmilitoj Esperanto-lernolibroj estis verkitaj de Stjepan Tomić (1919), Dušan Maruzzi (1922, 1923 / kune kun N. Bubalo/, 1927 kaj 1937) kaj Ivo Lapenna (1938, 1939). Tuj post la Dua mondmilito aperis la



tria eldono de la lernolibro de Lapenna (1946) kaj dum la kvindekaj jaroj estis publikigitaj Esperanto-lernolibroj de Fran Novljan (1953) kaj Božidar Vančik (1958) kaj la kvara eldono de la lernolibro de Maruzzi. La sesdekaj jaroj estis karakterizataj de tri pliaj eldonoj de tiu, laste menciita lernolibro. Dum la sepdekaj jaroj aperis kroata versio de la lernolibro de Ferenc Szilágyi laŭ la rekta metodo, verkita kune kun Josip Velebit (1976) kaj la unua Esperanto-lernolibro anoncinta la tiel nomatan Zagreban metodon de Esperanto-instruado (1979), kiu mondscale famigos siajn aŭtorojn per traduko en tridekon da lingvoj.

Josip Pleadin HISTORIO DE ESPERANTISMO EN KROATIO

Kvankam la unuaj esperantistoj en la teritorio de la nuntempa Kroatio aperis jam en 1889 en Osijek, kaj la unua organizita grupo en Rijeka en 1907, kiel turnopunkto estas konsiderata la jaro 1908, kiam en Zagrebo fondiĝis la unua organizaĵo, kiu havis tutnacion karakteron – Unuiĝo de kroataj esperantistoj (Društvo hrvatskih esperantista).



Ekde tiu momento la movado por Esperanto inter kroatoj, preskaŭ senĉese ekzistas plenan jarcenton, sukcesinte venki malfacilaĵojn politikajn kaj sociajn. En la jaro 2008, resumante la tutan buntan historion en mallonga prelego, ni ricevas almenaŭ suprajn bildon pri la grandeco de tiu movado kaj pri ĝiaj partoprenintoj.

Josip Pleadin LA ROLO DE LA GAZETO *LA SUDA STELO* EN DISKONIGO DE KROATAJ KULTURO, ARTO KAJ LITERATURO

Ekaperinta en Slavonski Brod en 1932 kaj malaperinta en Beogrado en 1972, la gazeto *La Suda Stelo* estis konsiderata ĉefe informa, sed ĝi havis ankaŭ tre akcentitan literaturan kaj kutluran notojn, speciale en 1960-aj jaroj, kiam la ĉefa informa gazeto de Jugoslavio estis *Jugoslavia Esperantisto* (1957-1963). En la periodo 1957-1961 *La Suda Stelo* reprezentis kulturajn, artajn kaj literaturajn atingaĵojn de esperantistoj kaj tradukan literaturon internacian, sed granda atento estis turnita ankaŭ al diskonigo de jugoslaviaj kulturaj valoraĵoj al internacia publiko. En tiu kunteksto, aparte bone estis prezentita kroata kultura medio kaj ĝiaj rezultoj.

Petar Radosavljević ESPERANTO KAJ LA RUMANA KONTRASTIVE

Rilate al la fakto, ke vortprovizo de Esperanto estas plejmulte latinindlingva, por tiu ĉi planlingvo kaj la rumana lingvo oni povas diri, ke ili estas parencaj lingvoj ligitaj per pruntvorta parenceco. En la unua parto de nia referaĵo estos analizataj leksikaj similaĵoj inter Esperanto kaj la rumana. En la dua parto ni pridiskutos kontrastive vortfaradajn kaj gramatikajn paradigmojn.

mr Nikola Rašić KONTRIBUO DE DALIBOR BROZOVIĆ AL ESPERANTOLOGIO KAJ INTERLINGVISTIKO

Dalibor Brozović jam de kvindek jaroj estas aktiva esperantisto: Li eĉ verkis originalan

poezion en Esperanto per kio li eniris kelkajn antologiojn. Li ankaŭ verkis plurajn eseojn pri la makedonaj lingvo kaj literaturo kaj publikigis aron da tradukoj de kroataj kaj makedonaj poeziaĵoj en Esperanto. Pri Esperanto Brozović okupiĝis ankaŭ kiel profesia lingvosciencisto, kaj iuj el liaj verkoj estas nemalhaveblaj por esperantologio kaj interlingvistiko. Aparte gravas liaj studoj pri la pozicio de Esperanto en tipologia klasifiko de lingvoj, kaj same verkoj pri litovaj kaj slavaj elementoj en Esperanto. En tiu ĉi kontribuajo temas pri la signifo de tiuj verkoj kaj ĝiaj plej gravaj kontribuoj al la sciencaj esploroj de Esperanto kaj planlingvoj ĝenerale.

mr Nikola Rašić PENSOJ PRI ARTEFARITA MONDLINGVO DE TOMO MARETIĆ EL 1891

Tomo Maretić faris la 10-an de decembro 1891 prelegon en la Jugoslava akademio en Zagreb titolitan *Pensoj pri artefarita mondlingvo*, kion oni povas konsideri unua interlingvistika verko de iu kroata lingvisto. En tiu verko Maretić analizas kelkajn artefaritajn mondlingvojn, inter kiuj ankaŭ volapukon kaj Esperanton, sed specialan inklinan li montras por Novlatin, projekto de itala interlingvisto Danilo Rossa. En ĉi tiu prelegon Maretić ankaŭ konsideras kelkajn ĝeneralajn bazajn temojn de interlingvistiko kiel disciplino kaj temo de lingvistika intereso. En tiu senco Maretić viciĝas apud lingvistoj kiel Hugo Schuchardt kaj J. K. Boudouin de Courtenay, kies spurojn ĉe kroatoj sekvas Dalibro Brozović.



Judita Rey-Hudeček INTERNACIA KULTURA SERVO - ESPERANTA KULTURA CENTRO

Dank' al siaj aktivaj kaj ideoplenaj esperantistoj Zagrebo jam 100 jarojn estas grava urbo sur esperantista mondmapo. En ĝi aktivis homoj, kiuj per sia aktiveco pliriĉigis Esperanton lingve, ideo kaj kulture. Unu el ili estis ankaŭ Tibor Sekelj. Liaj ideoj pri laboro "por kaj per Esperanto" forte influis zagreban Esperanto-movadon. Surbaze de ili fondiĝis Internacia Pupteatra Festivalo (PIF) kaj Internacia Kultura Servo (IKS). Ili ambaŭ ekzistas ankaŭ hodiaŭ kaj pliriĉigas zagreban kulturen vivon. PIF estante la plej malnova zagreba festivalo kaj IKS unu el ĝiaj kulturaj centroj.

Sed post jardekoj de "por kaj per Esperanto-aktivo" internacia lingvo ĉeestas nur



en iliaj nomoj. Kvankam ili ne plu plenumas celon pro kiu ili estis fonditaj, ili montris ke Esperanto kapablas esti vera kultura komunikilo.

Judita Rey-Hudeček LA ZAGREBA METODO

La ideo krei facilan kaj neŭtralan lingvon ne novas. Inter multaj projektoj ĝis nun Esperanto plej multe sukcesis. Sed kvankam Esperanto komence estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj, ĝi ne disvastiĝas tiom simple kiom li povus. Kaŭzoj estas multaj. Unu el ili estas manko de kapablaj instruistoj kaj taŭgaj lernolibroj.

En la jaro 1979, zagreba teamo, gvidata de Zlatko Tišljar, analizis la parolatan Esperanton kaj sur baze de ricevita rezultoj faris lernolibron kun la plej ofte uzataj gramatikreguloj kaj vortoj. La eksperimento montris, ke post nur 12 horoj da lernado laŭ tiu libro oni povus esprimi siajn simplajn pensojn.

La libro estas adaptita al 30 lingvoj, kaj certe estas internacie la plej sukcesa kroata lernolibro por iu lingvo.



Andel Starčević, Renata Geld ESPERANTO: KIO ĜI ESTAS KAJ KIU BEZONAS ĜIN?



Kiel planlingvo, Esperanto ekde ĉiam provokis kaj inter lingvistoj kaj en pli vastaj tavoloj de loĝantaro palettron da kontraŭaj sintenoj – de fervora entuziasmo ĝis akra malakceptado de ĝia uzado. Por ekscii, kiel ĉi-momente oni pensas en Kroatio pri la lingva inventaĵo de doktoro Zamenhof, ni faris esploron inter parolantoj de la kroata lingvo de diversaj aĝoj, edukniveloj kaj

seksoj. La esploro estas precipe kvalitspeca, kaj

niaj informantoj troviĝas en du ĉefaj grupoj: 1) studentoj de Filozofia fakultato (de anglaj studoj, de kroataj studoj kaj de psikologio) kaj de Fakultato pri elektrotekniko kaj komputilscienco (ambaŭ en Zagrebo) kaj 2) ĝenerala loĝantaro de Respubliko Kroatio. Ni decidis dividi la informantojn je tiuj du grupoj, supozinte, ke studentoj de la Filozofia fakultato estas informitaj pri Esperanto pli bone ol aliaj informantoj kaj disponas pri pli argumentplenaj sintenoj pri ĝia rolo en la kreado de kroata kultura identeco.

Spomenka Štivec TRADUKOJ DE LA KROATA LITERATURO PER ESPERANTO AL ALIAJ LINGVOJ

En la jaro 1913 en Kostajnica instruistino Antonija Jožičić proprakoste publikigis tradukon de romano *Konfeso* de tiam populara verkistino Milka Pogačić. Tiu Esperanta eldono servis al prestiĝa literatura tradukisto Wang Lu Yan por publikigo de la ĉina traduko

de la verko en 1931 en Ŝanhajo. Verŝajne tio estas la unua traduko de iu kroata verko ĉinen. Ĝi estas konservata en Ĉina Nacia Biblioteko en Pekino, en Kroatio troviĝas neniu ekzemplero. La sama ŝanhaja eldonejo Gangira, kiu publikigis *Konfeson*, nuntempe aganta en Pekino, en la jaro 1936 publikigis la romanon *Alkar* (Ano de l' ringludo) de Dinko Šimunović. La ekzempleron posedas Universitata kaj nacia biblioteko en Zagrebo.

Esperanto peris pri tradukado de ankoraŭ du kroataj verkoj ĉinen: en 2004 aperis *7000 tagoj en Siberio* de Karlo Ŝtajner kaj en 2006 *Wakajtapu* de Joža Horvat.

La verko *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* de Ivana Brlić Mažuranić estas la kroata libro kiun Esperanto plej malproksimen portis: per Esperanto estis kreita ties japana eldono (la unua eldono 2002, la dua 2005), persa eldono 2005, bengalaj eldonoj (2005 kaj 2006), vjetnama eldono 2008. Tradukis al respektivaj lingvoj Sekoguchi Ken, Achtar Etemadi, Probal Dashgupto kaj la duopo Phan Hong Vuong kaj Luong Ngoc Bao.

Esperanto peris krome ankaŭ pri tradukado de la kroata liriko al aliaj lingvoj (la ĉina, japana, islanda, malta) sed ĝi servis ankaŭ dum tradukado de la originala Esperanta literaturo, verkita de kroataj aŭtoroj, al la aliaj lingvoj.



Ivan Špoljarec PIF: KULTURA FENOMENO - FENOMENA FESTIVALO (40 JAROJ ... SPITE AL ĈIO)



Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) estas unika kultura evento kaj escepta kultura fenomeno laŭ sia ekesto, enhavo kaj daŭro.

La festivalon fondis kaj dum kelkaj unuaj jaroj organizis membroj de Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb kun la baza motivo uzi Esperanton en praktiko kiel komunikan kaj plenuman lingvon en profesinivelaj internaciaj kulturaj eventoj. La unua festivalo okazis en Zagreb

en 1968. De 1972 pri PIF zorgas tiucele fondita profesia institucio Internacia Kultura Servo (IKS).

La oficiala komunika festivala lingvo komence estis Esperanto en kiu ankaŭ la partoprenintaj teatroj plej ofte prezentis siajn teatraĵojn, sed, post la ŝanĝoj en la organiza teamo dum la 1990-aj jaroj, oni komencis pli kaj pli uzi la anglan kaj la kroatan kaj de tiam ankaŭ la prezentaĵoj okazas en la naciaj lingvoj. De la komenco la festivalon ornamas granda entuziasmo de la organizantoj samkiel de la partoprenantoj, agrabla kaj amikema etoso kaj multaj interesaj akompanantaj programoj. PIF elstaras ankaŭ pro la premio por la plej homama mesaĝo en prezentaĵo, kiu verŝajne estas unika en la mondo, kaj kiu portas la nomon de Tibor Sekelj.

PIF estas la plej longdaŭra internacia teatra festivalo en Kroatio kaj unu el la plej

rekonataj pupteatraj festivaloj en la mondo. Dum 40 jaroj (1968 – 2008) 334 pupteatroj el 47 landoj partoprenis la festivalon, okazis 660 diversaj teatraĵaj-prezentaĵoj (147 en Esperanto) kiuj estis luditaj entute 1627 foje. Spite al multaj kaj grandaj obstakloj kiujn PIF ĝis nun frontis ĝi ja plu vivas kaj iĝis alte taksata kaj prestiĝa kultura evento je fiero al ĉiuj kiuj estis aŭ/kaj estas ligitaj al ĝi.

Zlatko Tišljär EŬROPAJ VALOROJ

Eŭropa komisiono kunfinancis projekton en kiu partoprenis 4 partneroj el Germanio, Italio, Aŭstrio kaj Slovenio "Eŭropajn valorojn peri". La projekto daŭris 2 jarojn kaj interalie komparis la regulojn de Sankta Benedikto el la 6-a jarcento kun la nunaj konceptoj de valoroj kaj konsentis pri difino de deko da eŭropaj valoroj. Mi resumas la rezulton de tiu projekto per difino de 12 eŭropaj valoroj baze de kiuj devus stari edukado de junaj eŭropaj generacioj, kiu interalie konduku al eŭropa identeco ĉe la Eŭropanoj. Pli detale eblas informiĝi ĉe www.e-l-v.eu. La eŭropaj valoroj estas: 1. Eŭropo de paco, 2. Eŭropo de homaj rajtoj, 3. Demokratia Eŭropo, 4. Eŭropo de socialaj rajtoj, 5. Solidareca Eŭropo, 6. Subsidiareca Eŭropo, 7. Eŭropo de unueco en diverseco, 8. Eŭropo de egalaj ŝancoj, 9. Eŭropo de daŭrpova evoluo, 10. Eŭropo de tutviva lernado kaj scienco, 11. Eŭropo de libera kredelekto, 12. Eŭropo respondeca por si mem kaj por la mondo.



KONKLUDO POST LA SIMPOZIO “ESPERANTO KAJ KROATA KULTURA IDENTECO”

Velimir Piškorec

Estimataj gesinjoroj, karaj gekolegoj kaj geamikoj,

Pro la fakto, ke mi ne povis fermi la simpozion kaj persone Vin alparoli kaj danki al Vi pro la donacitaj klopodoj kaj tempo, permesu al mi kiel programkunordiganto de la scienca simpozio “Esperanto kaj kroata kultura identeco”, kunorganizita de Filozofia fakultato kaj Kroata Esperanto-Ligo la 7-an kaj 8-an de novembro en la

Konsilantarejo de Filozofia fakultato, ke mi faru tion ĉi-maniere. Samtempe mi uzas la okazon esprimi ankaŭ kelkajn opiniojn pri la simpozio mem kaj pri la rilatoj inter esperantismo kaj scineco.

DANKO

1. Plej varme mi dankas al ĉiuj geprelegantoj kiuj akceptis la inviton de la



organizantoj partopreni en la simpozio, kaj kiuj uzis siajn tempojn kaj energiojn por prepari la prelegojn kaj prezenti ilin. Laŭ la alfabeto ordo ili estas: prof. dr. sc. Vinko Brešić, Danijela Drakula, István Ertl, Renata Geld, dr. sc. Eldi Grubišić Pulišelić, dr. sc. Zlatko Hinš, Vlado Jurković, Davor Klobučar, dr. Ulrich Lins, dr. sc. Jozo Marević, Vjekoslav Morankić, mr. sc. Radenko Milošević, Kristian Novak, Josip Pleadin, Petar Radosavljević, mr. sc. Nikola Rašić, Judita Rey-Hudeček, Anđel Starčević, Aleksandra Šćukanec, Ivica Špoljarec, Spomenka Štimec kaj Zlatko Tišljar.

2. Mi dankas al Filozofia fakultato de la Universitato de Zagrebo kiu akceptis la proponon de Kroata Esperanto-Ligo esti kunorganizanto kaj gastiganto de la simpozio kaj kiu tiamaniere donis subtenon kaj kontribuon al la festado de la centjariĝo de fondo de la unua kroata nacia organizaĵo Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj. Aparte mi dankas al la estraro de Filozofia fakultato, kiu per vortoj kaj faroj montris al mi senrezervan helpon en la realigo de ĉi-tiu projekto: speciale al la dekanon prof. dr. Miljenko Jurković kaj vicdekanon pri scienco kaj internaciaj rilatoj prof. dr. Damir Boras. Al sinjoro Boras dankon, ke dum la preparoj kaj dum la simpozio mem li estis mia apoganto kiel homo kaj fakulo, kuraĝigante min por ne halti en la realigo kaj fino de ĉi tiu granda manifestacio. Mi dankas la afablecon, profesiecon kaj teknikan helpon ĉe la organizado de la simpozio ankaŭ al la teknika gvidantino de la konstruaĵo de Filozofia fakultato, sinjorino Đurdica Skender. Al sinjoro sonmajstro Slavko Ribić mi dankas la pretecon nian simpozion sone registri kaj pretigi respektivan sonregistraĵon kaj porokazan dokumentan filmon. Mi dankas ankaŭ al la pordista teamo de Filozofia fakultato kiu helpis ĉe la teknika realigo de la projekto, kaj al la purigistinoj kiuj ordigis la simpoziojn. Plej varman dankon al sinjoro pordisto Goran Polunić pro la farita unua helpo.

3. Mi dankas al ĉiuj membroj de la Honora komitato de la simpozio. Mi mencias ilin laŭ la alfabeto ordo: akademiano Dalibor Brozović, dr. Ivo Borovečki, dr. sc. habil. Detlev Blanke, prof. dr. Ivan Golub, prof. dr. Zrinjka Glovacki-Bernardi, akademiano prof. dr. Mislav Ježić, akademiano prof. dr. August Kovačec, prof. dr. Miljenko Jurković kaj prof. dr. Josip Silić. Ilia homa kaj faka subteno, subteno de renomaj mondaj fakuloj, kaj ilia fido pri la senco de la manifestacio kaj mia organiza engaĝiĝo, estis por mi netakseble gravaj.

4. Mi dankas al sinjoro mr. sc. Radenko Milošević, membro de la Organiza komitato de nia simpozio, pro la investita laboro kaj tempo rilate la kontaktojn kun la prezidanto de Respubliko Kroatio s-ro Stjepan Mesić, kaj pro la fakto ke li meritiĝis ke la prezidento akceptis la altan aŭspicion de nia festado de la centjariĝo kaj de la simpozio mem. Mi dankas al li ankaŭ pro la kontaktoj kun Ministerio pri kulturo, pro kio estis akirita financa subteno

de la menciita institucio. Dankon al li ankaŭ pro la koncepta kaj organiza engaĝiĝo pri realigo de la unua memstara ekspozicio de Esperantaj filatelajoj, kiu dum la simpozio estis prezentita en la reprezenta aŭlo de Filozofia fakultato.

5. Al sinjoro Nikola Turk el Kroata filatela asocio mi dankas pro la planado kaj organizado de la menciita filatela ekspozicio. Dankon ankaŭ al membroj de Studenta Esperanto-klubo kaj Esperanto-societo "Bude Borjan" el Zagrebo pro la tempo dum kiu ili dejoris apud la prezentitaj eksponaĵoj.

6. Al sinjorino Spomenka Štimec, sekretariino de Kroata Esperanto-Ligo aparte mi dankas pro la organiza, teknika kaj konsila helpo en la fina realigo de la simpozio. Dankon ankaŭ al sinjorino Jadranka Pavica Farszky pro la perfekta kunlaboro en la realigo de finance-teknikaj laboroj.

7. Al sinjoro Josip Pleadin mi dankas pro la helpo per tradukado de prelegresumoj al Esperanto, lektorado de la resumoj, presaj laboroj kaj fake-organizaj konsiloj. Plej varme kaj aparte mi dankas lin pro la homa engaĝiĝo kaj kuraĝigo en la momentoj kiam min alfrontis organizaj kaj interhomaj problemoj ligitaj al la simpozio.

8. Mi dankas al kolegoj esperantistoj Neven Kovačić, Nikola Rašić, Ankica Jagnjić kaj Judita Rey-Hudeček pro la korektaj simultanaj interpretadoj dum daŭro de la simpozio.

9. Dankon al la oficistoj de Ministerio pri kulturo, sinjorino Dubravka Đurić Nemeć kaj sinjoro Ćedomir Višnjić kaj al la oficistino de Ministerio pri scienco, klerigo kaj sporto, sinjorino Astrid Horvat, kiuj havis fidon pri la senco de nia simpozio kaj kiuj per sia persona engaĝiĝo kontribuis al ricevo de financa subteno bezonata por ĝia realigo.

10. Mi dankas al HINA, kroata informa novaĝentejo, al la dua programo de Kroata radio kaj al televidaj kanaloj OTV kaj Z1, kiuj objekte kaj bonintence informis la publikon pri nia simpozio. Apartan dankon al la ĵurnalistinoj Matea Damjanović (OTV) kaj sinjorino Farkaš (dua programo de Kroata radio).

11. Al la fama aktorino kaj esperantistino sinjorino Vida Jerman plej varme mi dankas pro la donacita tempo, kuraĝigo kaj homvarmo en la momentoj da senespero kaj malkuraĝo.

12. Plenkore mi dankas al la scienca novicino de la Germana fako de Filozofia fakultato Aleksandra Šukanec, sekretariino de la simpozio, kiu per sia junaĝa energio, per faka, teknika kaj emocia engaĝiĝo estis apud mi dum la preparoj kaj dum la realigo de la simpozio.

13. Dankon pro la amika subteno al sinjorino Eldi Grubišić Pulišelić en la Universitato de Split, kaj al sinjoroj Kristian Novak, Petar Radosavljević kaj Anđel Starčević, sciencaj novicoj de Filozofia fakultato en Zagrebo. Dankon al Nikola Rašić pro la amikaj konsiloj kaj malferma koro.

14. Sinceran dankon ankaŭ al ĉiuj ceteraj,

kiuj ne estas per nomo menciitaj, esperantistoj, filatelistoj, kolegoj el la Germana fako kaj Filozofia fakultato kaj al studentoj, kiuj ĉu per konsiloj ĉu per partopreno kontribuis al sukcesa religo de la simpozio.

REALIGO DE LA SIMPOZIO

1. En la internacia scienca simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco" el la antaŭviditaj 24 prelegoj, estis prezentitaj 23. Pro la pravigita neveno de unu preleganto, lia prelego ne okazis, sed ĝi estos en skriba formo sendita por simpozia libro.

2. Estis realigita la baza ideo de la organizantoj, ke la simpozio prezentu historion de la kroata esperantismo, la rolon de Esperanto kiel pontlingvo por prezentado de kroataj kulturaj atingoj en la mondo kaj aktivecoj de kroataj esperantistoj en la landa kaj eksterlanda kunteksto. Priraktitaj estis ankaŭ iuj ĝeneralaj demandoj, ekz. rilato de Esperanto kaj diversaj individuaj kaj kolektivaj identecoj.

3. En la simpozio partoprenis esperantistoj kaj neesperantistaj fakuloj, kaj la simpozio - kiel planite - okazadis en la kroata kaj en Esperanto. Escepte de niaj renomaj eksterlandaj gastoj István Ertl kaj dr. Ulrich Lins, kies prelegeoj estis en Esperanto, la aliaj partoprenintoj prelegis ĉu nur kroate ĉu kroate kaj Esprante. Dank' al engaĝiĝo de interpretistoj antaŭe menciitaj, ĉiuj partoprenintoj senprobleme povis sekvi la prelegojn, senkonsidere pri lingvo uzita. Apartan dankon meritas la vicdekano pri scienco kaj internaciaj rilatoj de Filozofia fakultato kaj prezidanto de la Organiza komitato prof. dr. Damir Boras, kiu sian salutparoladon - malgraŭ la fakto ke li ne estas esperantisto - legis en senera Esperanto.

4. La prelegantoj ĝenerale obeis la tempon planitan por siaj prelegoj, kaj la diskutoj kiuj sekvis estis interesaj kaj fruktodonaj.

5. Apartan signifon al la simpozio donas la fakto, ke en ĝi renkontiĝis esperantistoj - fakuloj kaj nefakuloj - kun fakuloj kaj studentoj neesperantistoj. Al la kroata Esperanta komunumo per tio estis prezentita unika okazo por en la plej granda, plej grava kaj plej renoma science-kleriga institucio el la kampo de sociaj-humanismaj sciencoj en Respubliko Kroatio, dignamane festi sian centjariĝon kaj prezenti sin per ĝi al la publiko. Aliflanke, Filozofia fakultato de la Universitato de Zagrebo montris - mi citu la vortojn de la vicdekano prof. dr. Damir Boras - senrezervan subtenon al instruado kaj scienca esplorado de Esperanto en kadre de siaj aktivecoj, pruvante per tio ne nur komprenon pri Esperanto kiel lingvo kaj pri esperantismo kiel movado, sed per sia malfermiteco kaj vasteco ĝi fariĝis unu el maloftaj universitatoj en la mondo kiuj sen antaŭjuĝoj aliras la menciitajn du fenomenojn.

6. Laŭ vortoj de la dekano de Filozofia fakultato, prof. dr. Miljenko Jurković, diritaj en la solena malfermo, la fakultato pretas publikigi ne nur simpozian preleglibron, sed ankaŭ aliajn sciencajn publikaĵojn kun esperantologiaj kaj interlingvistikaj problemaroj, en kadre de la aktivecoj de la eldonejo de Filozofia fakultato FF-pres kiel unu el la plej grandaj eldonistoj de fakaj libroj pri sociaj-humanismaj sciencoj en Kroatio. Ĉi tiu promeso estas granda rekonno ne nur de la alta kvalito de nia simpozio, sed ankaŭ de ĝenerale sciencaj disciplinoj de esperantologio kaj interlingvistiko.

7. Tiusence, kiel programkunordiganto, mi havas la honoron transpreni la devon kolekti la tekstojn por la simpozia libro kaj ĝian redaktadon. Ĉar temos pri scienca libro, eldonon de kiu el speciala fonduso por financado de sciencaj publikaĵoj subtenus Ministerio pri scienco, klerigo kaj sporto de Respubliko Kroatio, ĉiuj senditaj tekstoj estos submetitaj al procedo de anonima recenzado, kio garantios altan kvaliton de la planita publikaĵo.

8. Por certigi bonan reeĥon de tiu simpozia libro ne nur en la kroata, sed ankaŭ en la internacia faka publiko, ĉiuj pozitive recenzitaj kontribuaj estis publikigitaj en la kroata kaj en Esperanto. Teknikaj detaloj rilate longecon kaj formatigon de kontribuaj estis senditaj ĝis la 15-a de novembro 2008. Limdato por sendo estos la 31-a de januaro 2009. Kontribuaj estotaj post tiu dato ne estos konsiderataj.

KIEL PLUE?

La okazigo de la simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco" en Filozofia fakultato en Zagrebo, en kadre de la festado de la centjariĝo de fondo de la unua nacia Esperanto-organizaĵo en Kroatio, estas unuflanke grava paĝo en proksimigo de la Esperanta komunumo al la akademio, kaj aliflanke en rekonno de Esperanto kaj esperantismo flanke de kroata scienca kaj akademio publiko. En la enhave-faka senco, la simpozio montris, ke la historio de la kroata esperantismo kaj aktivecoj kaj atingoj de kroataj esperantistoj en la Esperanta kaj en neesperanta plano prezentas neelĉerpeblan fonton por estontaj esploroj. En tiu lumo la kroata Esperanta komunumo, senkonsidere pri interhomaj konstelacioj kaj personaj inklinoj kaj malinklinoj, devas fari ĉion eblan por ebligi al estontaj esplorantoj - ne nur esperantistoj, sed unuavice al interesiĝantaj sciencistoj neesperantistoj - alireblon al ĉiuj ekzistantaj publikaĵoj, dokumentoj kaj homaj kaj teknikaj kapacitoj.

Pro tio mi sendas mian inviton al ĉiuj kroataj esperantistoj, ke ili per donacado kaj prunto por kopiado de Esperantaj publikaĵoj kaj aliaj materialoj ligitaj al sia okupiĝo pri Esperanto, subtenu la iniciaton de Josip Pleadin, rilate la

fondon de kroata Dokumenta Esperanto-Centro en Đurdevac. Aparte gravas, ke multaj materialoj kiuj por la posedanto havas emocian valoron, ne devas esti fizike transdonitaj, sed nur pruntitaj por kopiado kaj skanado.

Nome, kiel esperantisto kaj sciencisto, mi estas regula uzanto de la planlingva kolekto de Aŭstria nacia biblioteko en Vieno, kaj mi scias kion signifas por sciencistoj unuloke havi je dispono la necesajn fontojn. Samtiel, pasintjare en Berlino mi partoprenis la konferencon de la germana Societo por interlingvistiko, kiun modele gvidas la renoma monda esperantologo kaj interlingvisto dr. Detlev Blanke, kie la ĉefa temo estis ĝuste la protekto kaj konservado de Esperanta dokumentaro por postaj generacioj! En tia lumo mi sugestas al la iniciatinto kaj liaj kunlaborantoj - kaj tiuj, mi profunde kredas, devus esti ĉiuj kroataj esperantistoj - komunikadon kun arkivista kaj dokumentista profesioj, kio ne devus esti problemo, se ni konsideras fakulojn kaj instituciojn kiuj nin favoras.

Plue, montriĝis, ke ĉi tiu simpozio esti pli ol kutima scienca kunveno kiajn ĝis nun plejparte mi partoprenis: krom la menciita kunligado de esperantismo kaj akademia komunumo kaj enpaŝo de esperantismo tra granda pordo en la kroatan sciencon publikon, mi havis la impreson, ke por la kroata Esperanta komunumo la simpozio servis kiel okazo por iaspeca finkalkulo kaj katalizado de la propra pasinteco, kio - senkonsidere pri diversaj kontraŭdiroj ideologiaj kaj personaj - estas akto de netaksebla graveco por firmigo kaj fortigo de la kolektiva identeco kaj necesa antaŭkondiĉo por daŭrigo de la kroata Esperanta tradicio kiun ni heredis kaj kies partoprenantoj ni nun estas.

Kore mi salutas Vin, pardonpetante ĉiujn kiujn mi senintence ofendis, pardonante ĉiujn kiuj fojfoje bonintence malfaciligis mian laboron kaj dankante plenkore al ĉiuj kiuj grave kontribuis al preparoj kaj sukcesa okazigo de nia simpozio.

En Zagrebo, la 9-an de novembro 2008

APERIS KATALOGO "CENT JAROJ DE KROATA LITERATURO EN ESPERANTO 1908-2008"

Kun ioma prokrasto aperis katalogo pri la ekspozicio "100 jaroj de Esperanta libro en Kroatio" kiu estis malfermita inter la 29-a de majo kaj 13-a de junio 2008 en la ejoj de Sveučilišna knjižara (Universitata librovendejo). La katalogon de la libroekspozicio eldonis Kroata Esperanto-Ligo subtenita de Urba oficejo por klerigo, kulturo kaj sporto de Zagrebo. Sur siaj 36 paĝoj la katalogo prezentas kroatingve (kun escepto de unu teksto, kiu aperis dulingve) la eseojn de Nikola Rašić ("Esperanto: granda lingvo por malgrandaj popoloj"), d-ro Ivo Borovečki ("Tradukoj el la kroata literaturo en Esperanton" kaj Spomenka Štimec ("Tradukoj de la kroata literaturo en Esperanton inter 1997 kaj 2008"). La eseo de Rašić estas tute nove verkita, dum la tekstoj de Borovečki kaj Štimec estas nur iomete modifitaj tekstoj jam publikigitaj en mutle pli ampleksa katalogo "Esperanto

en literaturo kaj politika vivo de Kroatio" eldonita en 2005. Tute nova informo estas la teksto pri financado de projekto de Kroata Esperanto-Ligo far Eŭropa komisiono, kaj aparte estas notitaj tradukoj el kroata literaturo al aliaj lingvoj pere de Esperanto.



LA CENTA NUMERO POR LA CENTJARA JUBILEO

"Tempo, la oficiala gazeto de Kroata Esperanto-Ligo, en novembro aperigis sian 100-an numeron! Ĝi komencis aperadi en la jaro 1980, kaj, krom escepto de la militaj jaroj 1993 kaj 1994, ĝi jam dum jardekoj estas la ĉefa informilo de kroataj esperantistoj. La jubilea numero aperis okaze de la 100-jara datreveno de la landa movado. Gratulon!

SOLENA KUNSIDO



Hrvatski savez za esperanto
ima čast
pozvati Vas
na svečanu sjednicu

**Stoljetnica esperanta
u Hrvatskoj**

koja će se održati
u subotu 13. prosinca 2008. godine
u 10 sati
u Staroj gradskoj vijećnici
Skupštine grada Zagreba
Ulica sv. Ćirila i Metoda 5

Hrvatski savez za esperanto - Kroata Esperanto-Ligo

**STOLJETNICA HRVATSKA
ESPERANTO
CENTJARIĜO KROATIO
1908-2008**

Kroata Esperanto-Ligo
havas la honoron
inviti Vin
al la solena kunvido

**Centjariĝo de Esperanto
en Kroatio**

okazonta
sabaton, la 13-an de decembro 2008
je la 10h00
en la Malnova Konsilantarejo
de la Urba asembleo de Zagrebo,
Strato sv. Ćirila i Metoda 5

 Redakcia kompilo

 Foto-studio "Kopešić"



LA LASTA ARANĜO DE LA JUBILEA JARO

En la jaro 2008 per pluraj aranĝoj kroataj esperantistoj solenis la unuan jarcenton de organizita Esperanto-movado en sia lando. La fina solenaĵo estis la solena kunsido "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio", organizita en la Malnova Konsilantarejo de la Urba asembleo de Zagrebo, sabaton, la 13-an de decembro je la 10h00. La solenaĵon, kiu okazis sub la aŭspicio de **Tatjana Holjevac**, prezidantino de la Urba asembleo de la urbo Zagrebo, kiu mem ĉeestis, partoprenis plurdeko da esperantistoj el ĉiuj partoj de Kroatio. Tra la programo gvidis la aktorino **Vida Jerman**. La ceremonio komenciĝis per kantado de kroata kaj Esperanta himnoj, kiujn prezentis la operkantisto-esperantisto **Neven Mrzlečki**. En la solena parolado la vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo **Radenko Milošević**, akcentante la kunligitecon inter Esperanto kaj la urbo Zagrebo dum la pasintaj cent jaroj, invitis marki novajn vojojn por daŭrigi la longan kaj fruktodonan tradicion.

Sekvis salutoj de ĝemelurbaj esperantistoj de Bolonjo kaj de Esperanto-societoj el Kroatio. Nome de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj la solenan kunsidon salutis ĝia sekretario **Damir Prpić**.

La prezidantino de la Urba asembleo de la urbo Zagrebo, sinjorino **Tatjana Holjevac**, kies patro Većeslav Holjevac, iama urbestro de Zagrebo, grave helpis la organizadon de la 58-a UK en 1953, en sia parolado montris al la ĉeestintoj profundan konon de Esperantaj eventoj. El la urbaj oficialuloj la kunsidon ĉeestis ankaŭ sinjoro **Dragutin Palašek**, reprezentanto de la urbestro **Milan Bandić**.

Post la parolado de s-ino Holjevac, sekvis la historia prezento de Esperanto en Kroatio, kiun preparis **Josip Pleadin**.

 **Josip Pleadin**

Apartan akcenton al la kunsido donis la du lastaj programeroj. **Neven Kovačić** por la dua fojo atribuis la "Premion Kalendulo", kiu konsistas el diplomo kaj mona premio de 1000 eŭroj. Ĉi-jare la premio estis atribuita al **Lucija Borčić** pro ŝia escepta kontribuo al Esperanto-movado, aparte pro la ĵus aperinta Granda Vortaro Esperanta-Kroata, la plej ampleksa Esperanto vortaro en Kroatio. Tiun vortaron fine de la kunsido prezentis la eldonisto **Damir Mikuličić**.

Kiel aparta programero okaze de la kunsido estis prezentita filatela ekspozicio organizita de profesoro **Nikola Turk**. En 2008 Kroata Esperanto-Ligo kuneldonis tri poŝtajn unikaĵojn. Pli frue, okaze de la scienca simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco" estis eldonita poŝtkarto. Okaze de la solenado de la Centjariĝo, kune kun Kroata filatela asocio estis eldonita koverto kun represo de la kroata himno "Bela nia patrolando", kiu estis publikigita en la unua antologio de kroata poezio "Kroataj poeziaĵoj" en la jaro 1912. Per la okaza poŝta stampo, desegnita de **Radenko Milošević** kaj farita de **Ivan Librić** prezidanto de Kroata filatela asocio, estis stampitaj poŝtmarkoj sur la unuataĝa koverto, la 13-an de decembro.

La urba asembleo regalis la ĉeestintojn per koktelo, kaj la Foto-studio "Kopešić", ankaŭ parte aŭspicie, zorgis pri foto-dokumentado. Estis farita komuna foto de la ĉeestintoj sur la Placo de sankta Marko.

Per fino de la kunsido, kroataj esperantistoj eniris la duan jarcenton de sia aktivado.



Sur la fotoj: 1) **Vida Jerman** gvidis tra la programo, 2) **Neven Mrzlečki** dum la kantado de himnoj, 3) **Nome de Kroata Esperanto-Ligo Radenkenko Milošević** bonvenigis la prezidantinon de la Urba asembleo sinjorinon **Tatjana Holjevac**

SALUTPAROLADO DE RADENKO MILOŠEVIĆ

Estimata prezidantino de la Urba asembleo sinjorino Holjevac, estimataj gastoj kaj geesperantistoj!

Salutanta vin ĉe la solenado de la Centjariĝo de Esperanto en Kroatio mi devas nepre diri kelkajn vortojn! En la poemo "Al Zagreb", la plej zagreba verkisto August Ŝenoa, versis jene: "Apud Griĉ, malnova monto ... Gora staras Zagreb hela", kaj la neforgesebla A. G. Matoš en la poemo "Nesto sen falko" skribis pri "Griĉ reĝa, banusa, mia olda!" en kiu "hejmis Zrinjski, feadis Lisinski, agis Vraz kaj Gaj, Mato Gubec larmis!". Jes gloras kaj blankas Zagreb ankaŭ per nia esperantismo. Nu, ne estas ĝi senfalka, ĉar niaj falkoj estas esperantistoj sur kies frunto estis Mavro Ŝicer kaj Dánica de Bedeković Pobjenička. La kolĉeno de granduloj kiuj enkonstruis sin en la internacian parolkomunikadon: Križanić, Bauer, Maretić, malfermis la vojon en la jaroj 1887, 1889, 1891, 1907, 1908, 1909, kiuj estis plenplenaj je Esperanto-eventoj ... ĝis la hodiaŭaj tagoj.

La urbo Zagreb kun siaj loĝantoj estis trapi ol naŭjarcenta historio la loko por multaj signifaj kaj belaj ideoj kaj eventoj. Ni povas denove uzi la tekston el la unua numero de "Kroata esperantisto": "Kiel anatŭ miljaroj la stelo aperis sur la ĉielo, kaj gvidis la homaron en novan epokon: tiel same ankaŭ nia verda stelo - sub la signo de la Paco kaj de la Amo - kondukis la homaron sur la sojlon de pli bela estonto."

Kiam oni aliras maljunulon, kia estas nia centjara esperantista movado, oni ne parolu pri liaj cent kandeloj kaj travivaĵoj ekde la unuaj ŝancelaj paŝoj. Sed ni menciu la vortojn de nia verkisto Petar Preradović: "... sen sia historiaĵo, vojaĝanto (estas) sen vojaĝbileto". Niaj iniciatintoj de Esperanto kaptis la kernon de tiuj profetaj vortoj kaj publikigis en la unua numero de "Kroata esperantisto" liajn versojn en la poemo "Mia ŝipo", kiuj estas por longa tempo, kaj ĝenerale kroate kaj esperantiste -



multsignifaj: Naĝu, naĝu ŝipo mia / Pelu for la rem' / Ne estante celo ia / Donu ĝin vi mem! (Plovi, plovi, moja lado, / U koj' goder kraj; / Ja ti cilja još ne nadoh, / Sama cilj si daj!). Nun ni esperantistoj, ĉe la transiro al la dua jarcento de Esperanto en Kroatio, devas doni "celon ian al ĝi, al Esperanto, mem"!

Ni ja konscias pri la monda, eŭropa kaj enlanda ekonomia situacio. Ni ja konscias pri la monda krizo en ĉiuj kampoj kaj regionoj kaj inter la popoloj: bataloj, malriĉeco, terorismo, interreligiaj bataloj. Sed, ni kroataj esperantistoj devas tre serioze pripensi la Esperanto-estontecon en nia lando, la paŝojn por trovi novajn vojojn kaj havigi al nia movado novajn fortojn kaj novajn gejunulojn. Ni devas pripensi kiel transdoni nian "flagon kun la verda stelo" al novaj generacioj, por ke ni ne hontu ke ni ne sukcesis antaŭenpuŝi tion kion postlasis al ni niaj esperantistoj-antaŭuloj. Ni devas trovi la vojon kiel konvinki niajn urbajn kaj ŝtatajn aŭtoritatojn pri uzebleco de Esperanto en la internacia komunikado, speciale en la momento antaŭ aliĝo al Eŭropa Unio!



SALUTPAROLADO DE SINJORINO TATJANA HOLJEVAC

Gesinjoroj,
Bonan tagon, bonvenon!



Mi dankas al vi pro la invito ĉeesti la solenan kunsidon festantan la Centjarigon de Esperanto en Kroatio. Kore mi salutas vin per bonveno en la Malnova urba konsilantarejo, en kiu ankaŭ nuntempe okazas la parlamenta vivo de nia urbo. Ĉi tiu nia konsilantarejo estis konstruita proksimume samtempe kiel via organizaĵo, kaj ĝi nombras pli ol cent jarojn da sia ekzisto, do iomete pli ol estas via datreveno. Tio, verdire, okazis antaŭ longa tempo. Pro tio mi sincere gratulas al vi la grandan datrevenon - cent jarojn da ekzisto!

Nia Zagrebo, la urbo kun riĉa kultura tradicio, la centro de scienco kaj kosmopolitisma orientiĝo, estas proksime ligita al la ekesto kaj daŭro de Esperanto, unuavice pro la ligiteco al Zagrebo de homo, kiu sincere batalis por justo, konkordo kaj interkompreniĝo inter la popoloj, laborinte la tutan vivon pri la realigo de siaj ideoj kaj tezoj, aŭtorinte pro tio Esperanton, d-ro Lazar Ludvig Zamenhof. Zagrebo tre frue fondis, en 1908, Unuiĝon de Kroataj Esperantistoj. Nu, mi ne volas paroli pri tio, pri kio vi scias pli multe ol mi, sed mi devas akcenti, ke mi sincere ĝojas pro tia honorinda datreveno kaj



pro la ekscio, ke en nia urbo kaj en la tuta Kroatio, Esperanto estas tre disvastigita, kaj ke, kiel jam anticipe menciite, Zagrebo antaŭ duonjarcento estis gastiganto de Universala Kongreso de Esperanto. Certe temas pri aktiveco per kiu la nocioj de spaco kaj tempo, proksimeco kaj malproksimeco kaj mapoj de homaj vojoj ŝanĝiĝas, kaj ĉion ĉi dank' al la logika kaj simpla neŭtrala, demokratia planlingvo, formita por kiel eble pli bona homa interkomunikado.

Pro tio, okaze de tiu ĉi granda datreveno, al la gastoj de la urbo Zagrebo mi deziras agrablan farton, kaj al vi ĉiuj kune sukcesan laboron kaj plej bonajn dezirojn por estonteco kaj disflorado de Esperanto.



Maldekstre: 1) Sinjorino Tatjana Holjevac inter esperantistoj, 2) La salonon plenigis esperantistoj el la tuta lando.

Supre: 1) Sinjoro Dragutin Palašek reprezentis en la kunsido la urbestron de Zagrebo s-ron Milan Bandić, 2) La jaro 1908 kaj la iniciatintoj de Esperanto en Kroatio Mavro Špicer kaj Danica Bedeković en la prelego de Josip Pleadin, grafike aranĝita de Maja Pleadin.

Dekstre: Josip Pleadin dum la prelego "Historio de esperantismo en Kroatio".



Premio

Kalendul



Mecenato de Esperanto, la kroata esperantisto Neven Kovačić, la 13-an de decembro, por la dua fojo proklamis la ricevinton de la Premio "Kalendulo". La pasintjara gajninto de la premio estis Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo, kaj laŭ takso de ĉiuj ĉeestintoj de la Solena kunsido "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio", la ĉi-jara premiito ne povis esti pli trafe elektita. La Premion gajnis la veterana esperantistino Lucija Borčić pro, kiel skribite en la porokaza diplomo "ŝia escepte grava kontribuo al landa kaj internacia Esperanto-movadoj, aparte en sfero de vortaristiko, kiu en 2008 estas kronita per apero de ŝia ĉefverko, Granda Vortaro Esperanta-Kroata".

En la Solena kunsido Neven Kovačić parolis pri la riĉa Esperanta-biografio de Lucija Borčić, post kio li transdonis la diplomon kaj la premian sumon de 1000 eŭroj al s-ro Damir Mikuličić, la rajtigita anstataŭanto de s-ino Borčić, kiu pro alta aĝo kaj sia sanstato ne povis persone ĉeesti.

Menciindas, ke la Fondaĵo "Kalendulo", ankoraŭ neoficiale registrita, serĉas la vojon por sia laŭleĝa registriĝo, sed eĉ antaŭ tio, la fondaĵkomisiono (Neven Kovačić, Spomenka Štimec kaj Judita Rey-Hudeček) atribuos du-foje jare po 1000 eŭrojn por Subvencio "Kalendulo" (en junio) kaj Premio "Kalendulo" (en decembro). Pli detale pri la Fondaĵo kaj la mecenato vi povas legi en "Zagreba Esperantisto" n-ro 4/2008.

Sur la fotoj: 1) Damir Mikuličić (tenas la diplomon) kaj Neven Kovačić en la momento de proklamo de la Premio "Kalendulo" por 2008, 2) La diplomo, 3) La premiitino Lucija Borčić kun la unua ekzemplero de ŝia ĉefverko (ankoraŭ sen kovrilfolio), 4) La titolpaĝo de "Granda Vortaro Esperanta-Kroata", certe la vivoverko de Lucija Borčić.

Fondaĵo "Kalendulo"
havas la honoron publike proklami, ke la

Premio Kalendulo


por la jaro 2008 estas atribuita al

Lucija Borčić

pro ŝia escepte grava kontribuo al landa kaj internacia Esperanto-movadoj, aparte en sfero de vortaristiko, kiu en 2008 estas kronita per apero de ŝia ĉefverko, Granda Vortaro Esperanta-Kroata.

En Zagrebo, la 13-an de decembro 2008

Por la Fondaĵo "Kalendulo":
Neven Kovačić




LUCIJA BORČIĆ

GRANDA VORTARO
ESPERANTA-KROATA

VELIKI RJEČNIK
ESPERANTSKO-HRVATSKI

Hrvatski savez za esperanto (Kroata Esperanto-Ligo)
Nj
Zagreb





Sur la fotoj: 1) Damir Mikuličić, posedanto de la eldonejo "Sveučilišna knjižara", kiu eldonis la vortaron de Lucija Borčić, 2) Spomenka Štimec, sekretarino de Kroata Esperanto-Ligo kun la unua ekzemplero de la vortaro, prezentita dum la Solena kunvido "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio", 3) Tiel aspektas la vortarego inter la kovriloj: densa teksto atente kompostita kaj bele presita.

Josip Pleadin

GRANDA VORTARO ESPERANTA-KROATA APERIS

La longe atendata libro estas en niaj manoj! Okaze de sia centjara jubileo kroataj esperantistoj ricevis la plej belan donacon el la manoj de honorinda veterana esperantistino Lucija Borčić. La senpacience atendata verko en sia presita formo estis solene prezentita dum la Solena kunveno "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio", la 13-an de decembro en Zagrebo. Prezentis ĝin la posedanto de la eldonejo "Sveučilišna knjižara", kiu kune kun Kroata Esperanto-Ligo entreprenis la grandan projekton. Sian financan subtenon al la projekto atribuis ankaŭ Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio, kaj kunhelpis plurdeko de fruperiodaj antaŭmendintoj.

La manuskripto, konsistanta el pli ol mil tajpitaj paĝoj, estis kelkfoje kompletigata kaj reviziata de la aŭtorino mem. Krome, kunlaboris Ivo Borovečki (pri anatomio kaj medicino), Marija Toplak (pri agronomio kaj botaniko), Dubravko Toplak (pri informadiko) kaj Petar Bogović (pri marfiŝoj). En sia presita vesto la libro konsistas el 432 paĝoj kaj enhavas 41.898 leksikajn unuojn. Ĝi

estas verkita ĉefe surbaze de la Nova PIV, sed tamen en ĝi sian lokon trovis ankaŭ 1583 ne-PIV-aj vortoj.

Meritite ĝi portas la atributojn de "la plej granda Esperanta vortaro en Kroatio", ĉar ĝi efektive estas la plej ampleksa iam ajn presita Esperanto-vortaro por kroatoj. Se oni scias la fakton, ke la aŭtorino naskiĝis en 1921, kaj ke ŝi verkis ĝin tajpante per tajpmaŝino, des pli oni devas honori tiun verkon. Sed, ankaŭ per tio ne finiĝas la mirinda laboro de Lucija Borčić. La sama eldonisto entreprenis la eldonon de la inversa, Granda Vortaro Kroata-Esperanta de la sama aŭtorino. Ĝia apero estas anoncita por fino de 2009.


La vortaron grafike prilaboris kaj enpaĝigis Stanislav Vidmar, kaj ĝi estas unu el maloftaj eldonaĵoj kiuj sian lokon trovis sur librobretaj de konataj librovendejoj, apud similaj alilingvaj verkoj.

La vortaro mendeblas ĉe Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio, esperanto@zg.t-com.hr



SUKCESA KAJ BONE VIZITITA FILATELA EKSPOZICIO

Okaze de la simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco", dum la samaj tagoj, la 7-an kaj 8-an de novembro, en la reprezenta aŭlo de Filozofia fakultato en Zagrebo okazis ankaŭ la unua ekspozicio de Esperantaj filatelaĵoj, kiun kunorganizis Kroata Filatelista Asocio (Hrvatski filatelistiĉki savez) kaj Kroata Esperanto-Ligo. Ekspoziciis po tri reprezentantoj de ambaŭ organizaĵoj. La filatelistojn per siaj eksponaĵoj reprezentis Nikola Turk, Marijan Segedin kaj Ljubinko Šapurić, kaj la esperantistojn Radenko Milošević, Josip Pleadin kaj Spomenka Štimec. La ekspozicio konsistis el 20 vitrinoj, kaj en aldonaj vitrinoj estis ekspoziciitaj Esperantaj libroj (pruntitaj de Kroata Esperanto-Ligo, Radenko Milošević kaj Velimir Piškorec). La teknikan laboron faris plejparte Nikola Turk (kiu ankaŭ malfermis la ekspozicion), helpita de Radenko Milošević. Inter multnombraj vizitantoj de la ekspozicio troviĝis filatelistoj, esperantistoj, partoprenantoj de la simpozio, sed ankaŭ multnombraj studentoj kaj profesoroj de Filozofia fakultato. Per abundeco de eksponaĵoj la ekspozicio surprizis eĉ bonajn konantojn de Esperanta filatelo. Ĝi montris ankaŭ, ke estonte oni devas pli ofte organizi similajn ekspoziciojn, ĉar la temo de Esperanto estas ofta kolektotemo ankaŭ ĉe neesperantistaj filatelistoj.







KROATAJ ESPERANTAJ FILATELAĴOJ

En la Jubilea jaro Esperantaj filatelaĵoj en Kroatio trovis sian lokon en kelkaj ekspozicioj (vidu la tekston "Esperanto en filatelo" en "Zagreba Esperantisto" n-ro 3/2008 kaj la tekston "Sukcesa kaj bone vizitita filatela ekspozicio" en ĉi tiu numero, paĝo 184, respektive la saman artikolon en nia portalo www.zagreba-esperantisto.hr). La lasta tia okazis dum la Solena kunsido "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio" en la malnova urba konsilantarejo de Zagrebo, organizita de la senlaca veterana filatelisto kaj membro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, s-ro Nikola Turk (vidu la apudan bildon), helpita de Radenko Milošević. Por seriozaj filatelistoj ni menciuj, ke en la Jubilea jaro aperis ankaŭ kelkaj filatelaĵoj en Kroatio.

Kroata Poŝto eldonis specialan poŝtkarton kun la bildo de la unua numero de "Kroata Esperantisto". La poŝtkarto estas normale aĉetebla en la poŝtoficejoj, kaj ĝi funkcias kiel regula poŝtkarto por enlanda trafiko. Sur ĝi troviĝas presita poŝtmarko kun la foto de "La futuro", la fama skulptaĵo de Jesper Neergard, starigita en Zagrebo en 2001.

La dua eldonaĵo estas speciala koverto kun unuataĝa stampo, kiu funkcias la 13-an de decembro en la poŝtoficejo 10101 Zagrebo. La filatelaĵoj estas mendeblaj ĉe Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, Goljak 43, HR-10000 Zagreb, Kroatio.





VINKO MILINKOVIĆ (1917-2008)

Samideano Vinko Milinković estis nesufiĉe konata al niaj esperantistoj, kvankam liaj politikaj kaj Esperanta biografioj estas kapturte interesaj. Li naskiĝis la 19-an de marto 1917 en Stari Mikanovci en Slavonio, kaj li estis unu el la plej aĝaj esperantistoj en Kroatio. Gimnaziano li estis en Slavonski Brod, la plej forta tiutempa Esperanto-centro, kie ekaperis ankaŭ la plej fruktodona Esperanto-gazeto "La Suda Stelo". Li apartenis al la generacio kiu esperantistiĝis en la tre grava jaro 1935 (en kurso gvidita de Marko Demetrović), kiam la enlanda movado sukcesis venki la t.n. "organizan problemon", kaj en la jaro en kiu la landa esperantistaro kongresis en Osijek, en la koro de slavonia regiono. Li kontribuis per kelkaj artikoloj al "La suda stelo" kaj "Skolta Esperantisto". Antaŭ la dua mondmilito li komencis studi agrikulturon en Zagrebo, kaj ekde tiu tempo

li fariĝis politike aktiva en la maldekstrula studenta movado. Pro la politika laboro li estis arestita de ustaŝoj en majo 1941 en sia naskiĝloko Stari Mikanovci kaj transportita en la koncentrejon Kerestinec. Tie samtempe troviĝis aliaj famaj politikaj maldekstruloj: Božidar Adžija, Ognjen Prica, Otokar Keršovani kaj aliaj. Post kiam 10 el ili estis mortpafitaj, en la koncentrejo Kerestinec okazis ribelo de malliberigitaj, en kiu ĉirkaŭ 90 ribelintoj pereis provante eskapi. Inter malmultaj kiuj sukcesis liberiĝi estis ankaŭ Vinko Milinković. En oktobro 1941 li estis kunfondinto de Psunja partizana taĉmento kaj kiel ĝia batalanto partoprenis multajn batalojn. Fine de la sama jaro (1941) li estis denove kaptita, kaj ekde tiam li pasis tra pluraj koncentrejoj: Nova Gradiška, Jasenovac, Žemun, Aland Ost apud Vieno (Aŭstrio), Szcezin (Pollando). Ekde 1942 li troviĝis en norvegaj koncentrejoj kune kun 5000 kaptitoj el tiama Jugoslavio, el kiuj nur 1800 travivis la duan mondmiliton. Lia okupiĝo pri Esperanto ankaŭ tie ne ĉesis. En la germana koncentrejo Eizand en Norvegio li kaŝe instruis Esperanton al 15-opo da siaj samsortanoj, kaj el la koncentrejo li kontaktis ankaŭ kun norvegaj esperantistoj en Trondheim, kiuj sekrete havigis por li norvegan lernolibron de Esperanto. Pro siaj meritoj li estis distingita postmilite per gravaj jugoslaviaj ordenoj, inter kiuj menciindas la "Partizana memormedalo 1941". Li sukcesis diplomiĝi pri agrikulturo nur postmilite, en 1956 en Zagrebo. Li laboris en Zagrebo en Centra administrejo de ŝtataj bienoj kaj poste

en Agrikultura fakultato de Zagrebo kiel asistanto ĝis 1958. De 1958 ĝis 1976 li estis lekciisto ĉe Agrikultura fakultato en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino). En 1976 li emeritiĝis kaj vivis en Rijeka (Kroatio), estinte membro de tiea Esperanto-societo de 1990 ĝis sia forpaso. Li forpasis en Rijeka la 16-an de novembro 2008. Ekde la komenco de aperado de "Zagreba Esperantisto", li estis ĝia abonanto kaj leganto. En aŭtuno 2008 ni petis lin skizis sian vivovoĵon, kion li promesis, sed la morto estis senkompata, kaj forprenis lin el niaj vicoj.



NADA ŽIVKOVIĆ (1937-2008)

Ŝi naskiĝis en Beogrado (Serbio) la 21-an de majo 1937, esperantistiĝis en Zagrebo kaj partoprenis plurajn Esperanto-aranĝojn, interalie la kongreson de jugoslaviaj esperantistoj en Ljubljana. Ŝi estis membrino de la zagreba Esperanto-societo "Bude Borjan". Forpasis la 27-an de marto 2008.

ZAMENHOFA TAGO EN BANJA LUKA

 **Miĉo Vrhovac**

En Banja Luka (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino) en la Popola kaj Universitata Biblioteko okaze de Jaro de lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, estis malfermita ekspozicio "ESPERANTO - PONTO INTER HOMOJ". La ekspozicion organizis kune la banjalukaj esperantistoj kaj la Popola kaj Universitata Biblioteko celante al la civitanoj de la regiono montri ke Esperanto estas aplikita en diversaj kampoj de la homa vivo: scienco, turismo, edukado, muziko, teatro, literaturo ktp. La ekspozicio estos je dispono de vizitantoj ĝis la fino de decembro.

La ĉefan pozicion en la salono havas la libro "ANTOLOGIO DE SERBA POEZIO 1200 - 2000".

Dum la solena malfermo parolis s-ro Ranko Risojević, direktoro de la Biblioteko, Miĉo Vrhovac, prezidanto de Esperanto-societo "La mondo", s-ro Ljubiša Preradović, estrarano de "La mondo", kaj s-ro Simo Milojević, honora membro de UEA. S-ro Milojević parolis pri la rolo de Esperanto en sia vivo kaj ĝenerale pri Esperanto en la hodiaŭa vivo tutmonde. Li solene malfermis la ekspozicion.

Dek ĵurnalistoj vizitis la solenan malfermon kaj raportis pri tiu interesa evento. Simo Milojević kaj Miĉo Vrhovac gastis en la matena programo de la ŝtata televido. Post la ekspozicio la ŝtata televido elsendis specialan programon pri lingvoj en kiu partoprenis Miĉo Vrhovac kaj Gorana Sekulić, menciante ankaŭ la Esperantan ekspozicion.

Esperanto-societo "La mondo" planas organizi novan kurson por komencantoj komence de februaro 2009, por kiu jam ekzistas 10 kandidatoj.

KOMUNA ZAMENHOFA TAGO EN KRAGUJEVAC

  **Dimitrije Janičić**

Serbiaj esperantistoj komune festis Zamenhofan tagon sabaton la 13-an de decembro en Kragujevac, la urbo kie la Esperanto-movado iam estis tre vigla kaj kie la Zamenhoftaga festo estis utiligita por refondo de Esperanto-societo. La iniciatinto kaj organizanto de ĉi tiu kunveno estis konata kragujevaca esperantisto kaj aktoro Saša Pilipović. Alvenis gastoj el Beograd, Niš, Zemun, Jagodina, Leskovac, Vranje, Zaječar, Čačak kaj Novi Sad, kaj partoprenis ankaŭ Višnja Branković el Triesto kaj Miĉo Vrhovac el Banja Luka (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino). Krom la riĉenhavaj prelegoj de Boriša Milićević, mr Radojica Petrović kaj Tereza Kapista, en la programo partoprenis ankaŭ Ĉedomir Štajn kaj Nikola Milojević, aktoroj de la urba teatro, la poetino Senka Tomić el Jagodina, zemunaj lernantoj el la lernejo por infanoj kun difektita vidpovo kie Esperanto estas instruata seninterrompe jam okdek jarojn, kaj per kabaredoj luditaj dum pasintaj universalaj kongresoj, prezentigis Saša Pilipović.

Reprezentantoj de Esperanto-societoj el aliaj urboj donacis al la novfondinta societo dudekon da Esperantaj libroj.

Post la oficiala programo estis organizita komuna tagmanĝo kaj vizito al la memor-parko Šumarice. La amika etoso daŭris per amuza muzika

programo dum la solena vespermanĝo en la hotela restoracio. La tagĵurnalo "Politika" (www.politika.co.rs) aperigis longan tekston pri la festo sub la titolo "Kragujevac revenas al Esperanto". Dum la festo oni povis aĉeti du novajn Esperantajn librojn: "Historio de Esperanto" de A. Korĵenkov, tradukitan serben el Esperanto kaj "Songo pri amo kaj morto" de Filip David, la konata serba verkisto. La libron Esperantigis Agnesa Eremija, membro de Beograda Esperanto-Societo.



En la Zamenhofa tago en Kragujevac kunkantas Nedeljka Ložajić kaj Saša Pilipović

UNUIĜO DE ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ OKAZIGIS SIAN JARKUNVENON

La 27-an de novembro en Kroata Ekonomia Ĉambro en Zagrebo (strato Draškovićevo 45) okazis regula jarkunveno de Unuiĝo de Zagrebaĵ Esperantistoj (UZE), kun partopreno de 15 membroj de la asembleo kaj unu gasto. En la 9-punkta tagordo estis traktitaj diversaj temoj. La komencan impulson al la jarkunveno donis la konstato de kelkaj membroj, ke en la Laborprogramo por 2009, en la komenca alineo estis skribite, ke UZE volas fariĝi asocio landnivele. En la diskuto estis asertite, ke UZE ne volas anstataŭi la nun ekzistantan Kroatan Esperanto-Ligon (KEL), sed ke pere de UZE la nekontenta membraro de KEL volas realigi laboron, kiu ne estas efektivebla pere de oficiala landa asocio de UEA. Tamen, UZE membriĝis al KEL, sed en sia statuto ĝi havas artikolon, kiu permesas al UZE aliĝon de eksterzagrebanoj kaj eĉ de alilandaj esperantistoj. Estas



akceptita la propono, ke la esprimo pri "landa" asocio, tamen estu forigita el la enkonduka parto de Laborprogramo por 2009.

Spomenka Ŝtimec, sekretario de KEL, kiu laŭdis la gazeton "Zagreba Esperantisto", tamen esprimis sian malkontenton, ĉar, laŭ ŝia aserto, pro tio la oficiala gazeto "Tempo" havas problemon pri financoj

ricevataj el oficialaj ŝtataj fontoj. Josip Pleadin, la ĉefa redaktoro, respondis, ke tiu aserto estas malĝusta, ĉar en la du pasintaj jaroj la eldonado de "Zagreba Esperantisto" estis ebla nur per abonoj kaj sponsorecoj, dum el ŝtataj fontoj ĝi ricevis nenium subvencion. Li atentigis s-inon Ŝtimec, ke la decido de la Estraro de KEL el 2005 klare subtenas la ideon eldoni la gazeton "Zagreba Esperantisto", se por tio troveblas fincaj fontoj. Por eviti arbitrajn asertojn, Radenko Milošević proponis, ke KEL faru unuecan planon de Esperanto-societoj por peti financajn rimedojn ĉe oficialaj instancoj, per kio estos evititaj tiuj problemoj.

En la Laborprogramo de UZE por 2009 estas menciita la neceso organizi rondan tablon de ĉiuj esperantistoj, kiuj volas diskuti pri evidentaj problemoj de la landa Esperanto-movado, sed ne enkadre de la oficiala Ligo. La ronda tablo estas proponita kiel libera tribuno, kie ĉiu povos diskuti kaj argumenti





por trovi komune kontentigan solvon. Tiu temo rezultis per propno de Spomenka Štmeć, ke tian kunvenon kunvoku Radenko Milošević nome de UZE kaj KEL. La propono estis unuvoĉe akceptita.

Mato Špekuljak klarigis la diferencon inter la portalo de UZE kaj la retpaĝaro de KEL, dirinte, ke la portalo de UZE

estas libera por ĉia kunlaboro, speciale enkadre de sia Forumo, kiu jam nun permesas libere, sen cenzuro, diskuti pri ĉiuj temoj, dum la paĝaro de KEL tion ne ebligas.

Spomenka Štmeć interesiĝis pri la ideo lanĉi informprospekton, kiun ideon klarigis Josip Pleadin, dirinte, ke ni devas ŝanĝi nian manieron

reklami Esperanton. Ni devas esti iomete pli "altrudaj" kaj uzi la neesperantistajn kunvenojn kie kolektiĝas multaj homoj, por disdoni tiajn reklamilojn. Tion UZE realigos jam ekde 2009.

Marija Jerković nome de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), la landa sekcio de ILEI, subtenas la ideon organizi seminariojn por instruistoj de Esperanto, kaj Spomenka Štmeć invitas UZE reklami la jaran renkontiĝon de kroataj esperantistoj en Osijek en 2009.

Krom la diskuto pri Laborprogramo por 2009, kiu efektive estis la ĉefa temo de la jarkunveno, oni akceptis raportojn pri laboro kaj financajn raportojn por 2008.

Laŭ la propono de Radenko Milošević, en la redakcio de "Zagreba Esperantisto" la redakcianinon Marica Brletić anstataŭos Mato Špekuljak.

LIBROAPOGO AL UNUIĜO DE ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Ses bibliotekoj ricevis subvenciojn de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller estis subvenciitaj la librokolektoj de Srilanka Esperanto-Asocio (265 eŭroj), Unuiĝo de Zagrebaĵ Esperantistoj (Kroatio; 260 eŭroj), Centro Internacia de Esperanto (Madagaskaro; 200 eŭroj), Esperanto-klubo de Elec (Rusio; 190 eŭroj), Triesta Esperanto-Asocio (Italio; 175 eŭroj), kaj Esperanto-Biblioteko de Limogio kaj Okcitanio (Francio; 160 eŭroj). Unuiĝo de Zagrebaĵ Esperantistoj kandidatis por la subvencio favore al Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Ĝurdevac.



Antaŭ la jarkunveno UZE distribuis membrokartojn kaj membromarkojn por la jaroj 2008 kaj 2009 al ĉiuj siaj membroj. Komence de 2009 aperos ankaŭ la planita JARLIBRO DE UZE, kiun la membraro ricevos tuj post la apero. En tiu libreto ĉiujare troviĝos respektivaj dokumentoj, raportoj kaj planoj de UZE. Krom en la presita formo, la Jarlibro estos havebla ankaŭ kiel pdf-dosiero. Ĉiuj (membroj kaj nemembroj) kiuj volas senpage ricevi ĝin per retroŝto, bonvolu sendi sian peton al zagreba.esperantisto@gmail.com

NOVA ZEO EN KROATIO: ESPERANTO-STRATO EN OSIJEK

La 22-an de decembro 2008 la Urba Konsilantaro de Osijek akceptis la proponon, ke unu strateto en la osijeka urboparto nomata Malsupra Urbo, ricevu la nomon Esperanto-strato (Esperantska ulica). La ideon lanĉis antaŭ kelkaj jaroj kaj preparis la necesajn dokumentojn por la longa decidprocedo de pluraj urbaj instancoj Esperanto-societo "iberiga Stelo". Starigo de strata nomŝildo espereble okazos en januaro 2009, kaj la 17-an de oktobro 2009 Osijek gastigos jaran renkontiĝon de kroataj esperantistoj.

KROATAJ ESPERANTISTOJ EN ALIAJ GAZETOJ

"SENNACIULO" n-ro 1241-1242/2008: "Intervjuo kun Dušan Adnadj".

"FEMINA" n-ro 15, septembro 2008: "Venuso, Afrodito, Danica" aŭtorita de Ljubica Sedmak.

SUBTENANTOJ DE DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO

Helpu la konstruigon de DEC per via sponsoreco kaj donacoj. Fariĝu:
ORA SPONSORO = 1.000 eŭroj
ARĜENTA SPONSORO = 500 eŭroj
BRONZA SPONSORO = 250 eŭroj
Aĉetanto de brikoj = 1 briko = 1 eŭro

Per mono en 2008 subtenis la projekton de konstruigo de DEC:

5. DONACO:
Violeta Pomer (Kroatio) 56,00 eŭroj

ĈU VI JAM RENOVIGIS VIAN JARABONON AL ZAGREBA ESPERANTISTO POR 2009?

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENC
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09

HUMURA LITERATURO EN ESPERANTO



Informoj, aliĝoj

Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org
Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu
OSIEK: <http://osiek.org>

ABONHELPA FONDUSO

Saldo	481,19 eŭroj
60. Istvan Ertl (Luksemburgio)	12,50 eŭroj
En 2008 kolektitaj:	493,69 eŭroj

Dankon al ĉiuj ĝisnunaj donacintoj.





Aparte mi gratulas vin pro la interesa kaj leginda "Zagreba Esperantisto" tre plaĉe redaktita.
Reinhard Hauptenthal
(Malaucene, Francio)

Karaj samideanoj, saluton! Mi ŝatus informi vin ke via gazeto "Zagreba Esperantisto" N-o 4(8) bone atingis min kaj pro tio mi tutĝoje dankas vin. Mi deziras al vi bonan laboron, plenan sukceson kaj longan vivon al via organizo kaj same al vi persone.
Kore salutas
Pierre (Benino)

Tre estimataj amikoj, mi elkore gratulas vin pro la tre bela retejo. Mi vizitis vian urbon en 1987 kaj renkontis Vida Jerman. Kiel ŝi fartas? Mi havas tre bonajn memoraĵojn pri via tre bela urbo.
Sincere, via
Saed Ahmad Farani
(Rawalpindi, Pakistano)

Via retejo estas ŝatinda, sed iomete tro abunda.
D-ro Aldo Taccani (Milano, Italio)

Dankon pro la bela maniero en kiu vi publikigis la artikoleon pri mi. Kun koraj salutoj
Anneke Buys (Nederlando)

Mi dankas al vi elkore pro la publikigo de miaj impresoj pri Kroatio en la n-ro 5/2008 de "Zagreba Esperantisto". Ĉi-kaze mi konfirmas mian opinion, ke via revuo farigis tiom bonkvalita, kaj tutampleksiga, ke ĝi konkurencas serioze ankaŭ aliajn movadajn kaj nemovadajn Esperantlingvajn revuojn.
Bardhyl Selimi (Albanio)

Via rubriko "Esperantistoj private" estas bonega ideo. Mi

ŝatus ekkoni s-ron Ivo Puharić se vi konas la telefonnumeron aŭ la adreson.

Roger Imbert (Kroatio/Slovenio)

Dankon al vi pro la du numeroj de via gazeto, el kiuj unu mi donis al Triesta Esperanto-Asocio. Ĝi estas tre interesa kaj bele farita. Venontjare meze de

majo TEA organizos fervojistan kongreson. Ĉu eble iuj el vi partoprenos ĝin?

Laura Lukač Sancin (Triesto, Italio)

Tre agrable mi surpriziĝis vidinte en "Zagreba Esperantisto" la foton el mia Esperanto-ĝardeno.

Smail Grbo (Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino)

PUBLIKE PRI ESPERANTO

La 15-an de septembro "Večernji list" en sia aldonajo "Obzor" publikigis vojaĝpriskribon de Nikola Kuprešanin pri Japanio, en kiu estas menciita Oomoto kaj Esperanto enkadre de ĝi.

La 1-an de oktobro en "Slobodna Dalmacija" aperis la teksto "Esperanto za heroja Vranića", kies aŭtoro estas D.G. (=Davor Grgat).

La 6-an kaj 7-an de novembro la televida kanalo OTV en sia elsendo "Svakodnevnica", dediĉita al la Simpozio en Filozofia fakultato, gastigis d-ron Velimir Piškorec kaj Spomenka Štimec.

La 7-an de novembro la dua programo de Kroata televido intervjuis d-ron Velimir Piškorec pri la Simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco".

La 7-an de novembro en TV Nova 8-foje aperis kuranta teksto pri la centa datreveno de Esperanto en Kroatio.

La 7-an de novembro la televida kanalo Z1 elsendis filmon pri la malfermo de la Simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco".

"Večernji list" en sia numero de la 6-a/7-a de novembro publikigis informon pri la Simpozio "Esperanto kaj kroat akutlura identeco".

"Fokus" en sia numero de la 7-a de novembro publikigis la tekston de Radenko Milošević titolitan "Esperanto i hrvatski kulturni identitet".

La 11-an de novembro "Školske novine" publikigis la artikolon "Obljetnica jezika nade" aŭtoritan de sia ĵurnalisto Branko Nad.

La 15-an de decembro en "Slobodna Dalmacija" Davor Grgat publikigis en la kultura rubriko al tekston "Zagreb - stogodišnjica esperanta".

La 30-an de decembro en "Slobodna Dalmacija" aperis la teksto "Splićani u esperantskom pokretu", kiun verkis Davor Grgat.



Ni estingas fajron ekde 1930

fajroestingaj aparatoj kaj ekipaĵoj
memaktivigaj aparatoj
stabilaj sistemoj
fajroestingado
sanprotekto kaj sekureco
mediprotektado
sekureco kaj prevento de akcidentoj

PASTOR

G R O U P

www.pastor-group.com



GASILSKA OPREMA • GASILSKI SERVIS • GASOP • PASTOR BH • PASTOR DISTRIBUCIJA I INŽENJERING • PASTOR KOSOVA • PASTOR
MAKEDONIJA • PASTOR PROTUPOŽARNI SISTEMI • PASTOR SERVIS • PASTOR TVA • VATROSPREM • PASTOR FIRE&SAFETY
BOSNIO KAJ HERCEGOVINO • KOSOVO • KROATIO • MAKEDONIO • MONTENEGRO • RUMANIO • RUSIO • SERBIO • SLOVENIO